

ISSN 0032-4361


3

1991


中國報道

EL POPOLA


CINIO















## INTER NI

Via artikolo pri la karnavalo de Binche (en la n-ro 11, 1990) kompreneble multe ĝojigis nin, kvankam ĝi ne tute fidele spegulas la tiean okazaĵon.

Ŭnue, oni devas scii, ke la veraj karnavaluloj en Binche estas "La Gilles" (pron. Ĵil). Vi eĉ ne citas tiun nomon en via artikolo. Tiuj Ĵil ne rajtas aperi en iu ajn urbo. Ili do vidiĝas nur en Binche.

Due, vi ne montris iliajn belegajn ĉapelojn el struto-plumoj.

**HENRI kaj JULIA  
CASTIAU (Belgio)**

*Vere, nia artikolo pri la karnavalo de Binche estas nekompleta enhave. Niaj legantoj Castiau faris al ĝi gravan suplementon kaj sendis al ni foton pri karnavaluloj kun ĉapeloj el struto-plumoj. La foto, kun nacia gusto, aspektas vere bela. Bedaŭrinde, ni malfrue ricevis ĝin, tial ne eblis por ni aperigi ĝin. Estas admiringe, ke niaj legantoj Castiau tiom zorgas pri nia revuo kaj montris nian mankon. Dankon al ili! Ni deziras, ke niaj legantoj kiel kutime prezentu al ni siajn opiniojn pri artikoloj kaj fotoj de la revuo, por ke ni plibonigu nian revuon.*

**La Red.**

Nova televida turo en Pekino, la plej alta en Azio

Foto de LIU SIGONG



# ENHAVO

## 22 Ĉinaj virinoj

30 Elstaraj ĉinaj sportistoj

49 LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (22):

Subprovinco ĉe landlimo

42 ANTIKVAJ ĈINAJ FILOZOFOJ:

Blanka ĉevalo ne estas ĉevalo

27 ARTOJ DE ĈINIO:

Neĝo, olepentraĵo kaj poemo

20 EL ĈINAJ GAZETOJ

38 Tranokto ĉe Meizigou (Novelo)

48 POR VIA SANO:

Gimnastiko kontraŭ gastroptozo (I)

36 MIRINDAĴOJ DE ĈINIO:

Pikturo de senmana Yang Guoying

45 AMUZOJ

6 VOJAĜO EN TIBETO (II):

## Potala-palaco

11 Esperanto, reformo kaj pord-malfermo

14 Verda stelo brilas en Milvokio de Usono

37 Legendo pri la kreiĝo de la libro

Taŭtekingo dum la elmigrado de Laŭzio  
16 Vi ne foriris, kara Brigitte!

44 POR KOMENCANTOJ:

Kiel ĉinoj donas kaj akceptas donacon?

17 ESP-NOVAĴOJ

4 INTER NI

34 KURANTAĴ AFEROJ

41 KORESPONDI DEZIRAS

SUR LA KOVRILO:

Juna brodistino

Foto de LI CHUNGENG

2 Pogranda vendo de legomoj Foto de WU XINHUA

4 Nova televida turo en Pekino, la plej alta en Azio

54 Recitalo de Li Xiuming

Fotoj de CAI HAIFENG

10 Antikva urbomuro de Pingyao Fotoj de YAN JIN

18 Longvivuloj en Pekino

Fotoj de WEI LIAO

46 Yangjiabu — hejmloko de novjaraj bildoj

Foto de WU XINHUA

SUR LA DORSKOVRILO:

[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]

Malnova konstruaĵo en haveno


de HOOGELAND MARIËT (Nederlando)

Ĉe sunsubiro


de SIEGFRIED BAIER (Germanio)

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Hubei-provinco (p. 12)
2. Qingdao (p. 13)
3. Tai'an (p. 13)
4. Hainan-provinco (p. 13)
5. Xi'an (p. 13)
6. Tianjin (p. 11)
7. Lhasa (p. 6)
8. Pingyao-gubernio (p. 46)
9. Yangjiabu (p. 46)







## VOJAGO EN TIBETO (II)

Teksto kaj fotoj de LI QIANG

# POTALA



Perla pagodo Foto de CHEN ZONGLIE






Potala-palaco




Religiaj aktivadoj de lamaoj Foto de LIU HUI

La Sunluma Halo Foto de CHEN ZONGLIE



# PALACO



Interne de la palaco



**S**UB la blua ĉielo ĝi majeste staras sur la tegmento de la mondo kaj rigardas malsupren, elmontrante sian imponecon de sankta palaco de budhismo. Ĝi estas senkompara en la majesteco kaj multe superas la Turon Foxiang en la Somera Palaco, Pekino, la Turon Flava Gruo sur la monto Serpento ĉe Yangzrivero kaj la modernajn ĉielskrapantojn en Kantono. Ĝi estas Potala-palaco.

Mi venis tien kaj longe suprenrigardis tiun sanktan palacon.

Potala-palaco estas ruĝa meze kaj blanka ambaŭflanke kaj malsupre. Kun okulfrapaj koloroj kaj orbrilaj tegmentoj, la palaco aspektas, kvazaŭ ĝi ŝvebus en la nuboj kaj pendus sur la blua ĉielo. Gvidisto diris al mi, ke la ruĝa parto nomiĝas Ruĝa Palaco, kie troviĝas relikvostupaoj de diversgeneraciaj Dalai-lamaoj, kaj la blanka nomiĝas Blanka Palaco, kiu servis kiel rezidejo de Dalai-lamaoj kaj loko por religiaj aktivadoj.

Ĉu pro estimo, ĉu pro miro? Kun komplika kaj urĝa animstato, mi suriris la ŝtonajn ŝtuparojn kondukantaj al Potala-palaco kaj enviciĝis inter la budhistoj, kiuj turnas preĝradon kaj de tempo al tempo klinas sian kapon surteren. Lhasa altas je pli ol 3 700 metroj super la marnivelo. Pro manko de oksigeno, la ŝtonaj ŝtuparoj ŝajnis al ni tre longaj kaj la palaco neatingebla. Anhelante, ni haltis de tempo al tempo por iom ripozi.

Kiam ni eniris en la pordegon de la palaco, aperis antaŭ ni vasta teraso, t.e. amuza loko destinita por Dalai kaj nobeloj, ĉirkaŭe estas loko, kie oni spektas tibetajn teatraĵojn kaj dancojn. Okcidente de la teraso troviĝas serio da lignaj eskaloj malaltaj, sed apikaj, kiuj kondukas al la halo de Potala-palaco. La mezaj eskaloj estis destinitaj por Dalai-lamaoj. Ni supreniris laŭ flankaj eskaloj kaj venis en la galerion, kie imponas la fajne gravuritaj kolonoj kaj pordegoj kaj okulfrapas la grandaj freskoj ambaŭflanke de la galerio, el kiuj la plej famaj estas tiuj, kiuj priskribas, kiel Sunzamkampo, iama reganto de Tibeto, edziĝpetis al la imperiestro de Tang-dinastio kaj kiel la princino Wencheng eniris en Tibeton.

La geedziĝo de Sunzamkampo kaj la princino Wencheng estas historia atesto de la solidareco kaj amikeco inter hanoj kaj tibetanoj. En la 7-a jarcento, kiam Tang-dinastio fondis potencon regimon en la landinterno de Ĉinio, Sunzamkampo unuigis Tibeton kaj starigis Tubo-regnon sur la Tibeta Altebenaĵo. En 641, Sunzamkampo sendis subulon kun valoraj donacoj al la suvereno de Tang-imperio por edziĝoligiĝo kun Tang-imperio. Tiam multaj nacimulplimultaj senditoj venis al la kortego de Tang-imperio por edziĝoligiĝo. La suvereno Taizong de Tang-imperio faris 5 demandojn por ekzameni la senditojn. La tubo-a sendito sukcese solvis ĉiujn demandojn kaj tial la imperiestro Taizong decidis



Statuo de Sunzamkampo

edzinigi la princinon Wencheng al Sunzamkampo. la freskoj similaj al bildrakonto montris tiun ĉi historion.

Sunzamkampo, la plej saĝa gvidanto en la pasinta Tibeto, unuiginte ĉiujn tribojn, prenis Lhasa kiel ĉefurbon kaj komencis konstruigi Potala-palacon. Kvankam la palaco estis bruligita, rekonstruita kaj grandigita, tamen hodiaŭ ankoraŭ vidiĝas groto-tipa halo, konstruita dum regado de Sunzamkampo, ĉe kies muroj staras multaj statuoj. La statuo de Sunzamkampo kun belaj haroj kaj simplaj vestoj havas malgrandan kapon sur sia alta ĉapo, kio tre mirigis min. Oni diris al mi, ke tibetanoj rigardis Sunzamkampon kiel dion. Ĝuste pro tio, ke li havis du kapojn, li estis tiel saĝa kaj brava! Poste mi rimarkis, ke ĉiuj liaj statuoj kaj portretoj havas du kapojn. La statuo de la princino Wencheng el Tang-imperio kaj tiu de lia alia edzino, la princino Chizun el Nepalo, estas delikataj en la vizaĝtraĵoj, serenaj kaj trankvilaj en la mieno. Apud ili sidas alia virina statuo kun infano en siaj brakoj. Ŝi estis unu el liaj tibetaj edzinoj, kiu naskis por li la solan filon.

La relikvostupaoj estas sepultejo de Dalai-lamaoj. Laŭ la tibetaj moroj, oni traktas mortintojn per akva aŭ ĉiela sepulto. Ĝenerale dirite, oni ne konservas la kadavrojn. Nur malmultaj religiaj gvidantoj, kiaj vivaj budhoj, rajtas kuŝi en stupao post la morto. Post kiam viva budho mortis, oni ŝmiras lian kada-



Statuo de Wencheng

vron per salo. Post sekigo de la kadavro oni ŝmiras ĝin per balzamo kaj tibetaj medikamentoj kaj konservas ĝin en stupao por eterne. En Potala-palaco troviĝas 8 relikvostupaoj por Dalai-lamaoj de la Kvina ĝis la Dektria, escepte de tiu de Cangyang Jiaco, Dalai-lamao la Sesa. Li verkis multajn am-poemojn, kiuj ĝis nun estas recitataj de tibetanoj. Vivinte 8 jarojn en Potala-palaco, li estis eksigita kaj vivis vagabonde. Tial en Potala-palaco ne troviĝas lia relikvostupao.

La stupao de Dalai-lamao la Kvina estas la plej granda. Ĝi, 14.85 metrojn alta, estas tegita per 370 kg. da oro kaj inkrustita per granda kvanto da perloj, jado, agato, oraĵoj kaj arĝentaĵoj. Dalai-lamao la Kvina, Luosang Jiaco, estis fama en la tibeta historio. Dum sia regado li rekonstruigis Potala-palaco, kiu havis preskaŭ la hodiaŭan amplekson. En la halo por Dalai-lamao la Kvina pendas multaj fajnaj freskoj, kiuj priskribas liajn meritojn. Unu el tiuj freskoj montras, kiel Dalai-lamao la Kvina en Pekino respektplene vizitis la imperiestron Shunzhi (1644-1662 sur la trono) de Qing-dinastio. En alia halo konserviĝas edikto, per kiu la imperiestro Shunzhi oficiale nomumis luosang Jiaco Dalai-lamao la Kvina en 1653, kaj ora sigelilo. De tiam Dalai-lamaoj de diversaj generacioj devis esti sankciitaj de la Centra Registaro, kaj la delegito de la Centra Registaro en Tibeto prezidis la cere-

monion en Potala-palaco por ili, kiam Dalai-lamao heredis la titolon kaj transprenis regpotencon.

En la historio de Tibeto Dalai-lamao la Dektria estis politikisto ĝuanta altan prestiĝon. Ankaŭ en lia relikvostupaa halo konserviĝas freskoj, prezentantaj lian vivon, kaj multaj raraj trezoroj, el kiuj estas delikata kaj valorega pagodo el pli ol 200 000 perloj.


La Blanka Palaco servis al Dalai-lamaoj kiel rezidejo kaj loko por sutro-recito. Sude de la dormoĉambro estas vitra fenestropordo, dank' al kiu la ĉambro estas bone prilumata. Ĝi estas nomata ankaŭ Sunluma Halo. La lito kaj seĝoj de Dalai-lamaoj estas lokitaj kiel antaŭe. Niĉo por budhostatuo kaj halo por sutro-recitado estas grandiozaj, ĉie brilas perloj kaj gemoj. Tie mi vidis lanternon el homa kranio. Malgraŭ ĝia lukseco, ĝi tamen min impresis terure. En la malnova servuta Tibeto la sklavposedantoj rajtis torturi kaj ekzekuti sklavojn, fari ujon el ilia haŭto kaj ostoj. Ŝajnis al mi, ke la lanterno kun larĝe malfermita buŝo akuzis al mi pri tiu kruela historio. Mia koro tremis kaj sangis.

Post la vizito mi provis rememori, kiom da ŝtupoj mi trapasis, kiom da pordegoj mi trapasis kaj kiom da haloj mi vizitis, tamen mi ne sukcesis. Prave oni diris, ke la Potala-palaco similas al labirinto. ■

## ABONTARIFO DE EPĈ POR 1991

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	16.00	26.00	36.00
Aŭstrio	ATS	215	360	500
Belgio	BEF	620	1020	1400
Germanio	DEM	32.00	54.00	76.00
Britio	GBP	9.50	15.00	21.00
Finnlando	FIM	72.00	117.00	163.00
Francio	FRF	102.00	165.00	225.00
Hispanio	ESP	1550	2500	3500
Italio	ITL	20600	33500	46500
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	35.50	61.00	85.00
Nov-Zelando	NZD	21.70	36.00	50.00
Portugaliao	PTE	1550	2500	3500
Svisio	CHF	26.80	44.00	64.00
Usono	USD	15.50	26.00	36.00
Kanado	CAD	15.00	25.00	35.00
<b>Por aliaj landoj en Eŭropo:</b>				
	USD	11.50	18.50	26.00
<b>Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:</b>				
	USD	7.80	12.50	17.50






Antikva urbomuro


# Antikva urbomuro de Pingyao

Fotoj de YAN JIN

En Pingyao de Shanxi-provinco, kultura urbo en la ĉina historio, ne mankas historiaj restaĵoj. Unu el ili estas antikva urbomuro. Ĝi estis konstruita en 827-728 a.K. Kaj la resta parto rekonstruiĝis en 1370. La kvadrata muro havas perimetron de 6 157.7 m kaj alton de 6-10 m, larĝon de 3-6 m ĉe la supro. Ĝi estas ramita interne kaj masonita el brikoj ekstere, kun brikoj defluiloj. En kvar anguloj staras po unu turo. Krome sur la muro estas 72 malgrandaj turoj kaj 3 000 kreneloj. Ekster la muro estas parapeto alta je 2 m por defendi soldatojn. La urbo bone konserviĝas. Ĝi estas garnita per kasteloj kaj ses pordoj.



Pordo de la urbo



Flanka pordo de kastelo

# Esperanto, reformo kaj pord-malfermo

Teksto de LIU LING\*

Fotoj de EPĈ-raportistoj



Laborantoj de ĈEL

Laborantoj de ĈEL kaj ĝia honora prezidanto Jelezo (meze)



**A**NTAŭ 40 jaroj fondiĝis la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL). En tiuj 40 jaroj E-movado multe progresis en la nova Ĉinio.

## MALGLATA VOJO

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, la popola registaro tuj montris sian ŝaton al la E-movado. Dank' al la granda penado, ĉinaj esperantistoj, reprezentataj de s-ro Hujucz, kreis en 1950 la Esperantan revuon "El Popola Ĉinio" (EPĈ) distribuatan al la tuta mondo kaj en 1951 fondiĝis ĈEL kaj samtempe ili eldonis Esperantajn librojn. Bedaŭrinde, influate de la tiamaj internaciaj cirkonstancoj, en 1954 EPĈ kaj ĈEL ĉesis sian laboron.

Dum sia vizitado eksterlande en 1956, s-ro Hujucz faris esploron pri alilanda E-movado. Reveninte Ĉinion, li proponis al la registaro revigligi la Esperantan aktivadon. En la nova situacio ĈEL denove ekfunk-

Ekspozicio memore al la 100-jariĝo de Esperanto en Pekino, 1987






ciis. En 1957 la redakcio de EPC rekomencis sian laboron kaj samtempe sin okupis pri eldonado de Esperantaj libroj. Tiam evidente pliboniĝis la kvalito de la revuo kaj multiĝis la Esperantaj libroj. En 1963 ĈEL okazigis ekspozicion de Esperantaĵoj kaj la Unuan Tutlandan Labor-kunvenon de Esperanto.

Nia estimata vicĉefministro Chen Yi vizitis la ekspozicion kaj tre kontentiĝis. Li faris gravan paroladon en la labor-kunveno. En sia parolado li alte taksis la rolon de Esperanto kaj esprimis sian dankon al la laborantoj por Esperanto en la nomo de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la registaro. Li fervore helpis kaj kuraĝigis la ĉinan E-movadon. Tio multe stimulis la ĉinajn esperantistojn. En la sama jaro la Eduka Ministerio anoncis, ke oni povas funkciigi E-kurson en altlernejoj. La Ĉina Popola Universitato funkciigis E-kurson por instruistoj el 11 altlernejoj. La Pekina Radio-Instituto 3-foje sinsekve funkciigis E-kurson kaj elkulturis 26 esperantistojn. En 1964 Radio Pekino komencis Esperantan disaŭdigon, kovrantan grandan areon en la mondo. En 1966 la Fremdlingva Eldonejo ekhavis Esperantan Sekcion, la unuan fakan E-eldonan establilon de Ĉinio. La Esperanta Sekcio de GUOJI SHUDIAN (t.e. la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio) okupiĝas pri distribuado de la Esperantaj eldonaĵoj al aliaj landoj.

## ŜANCOJ KAJ DISVOLVIĜO

En 1973 ĈEL denove starigis kontakton kun alilandaj E-organizoj. Dank' al praktiko de reforma kaj pord-malferma politiko, la entuziasmo sufokita dum multaj jaroj elŝprucis, precipe gejunuloj elmontris fortan avidon je scioj. Dank' al pord-malfermo oni ekkonis pli klare la rolon de fremdaj lingvoj, kio portis al Esperanto-movado bonan ŝancon. Esperantistoj de multaj lokoj spontanee faris diversajn aktivadojn. En 1979 ĈEL okazigis la Duan Tutlandan Labor-kunvenon de Esperanto. Ĝi markis komencon de la nova periodo de la ĉina E-movado.

Maje de 1979 fondiĝis la Hubei-a E-Asocio, la unua provinca E-organizo. Poste 27 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj starigis sian E-asocion unu post alia escepte de Guizhou, Qinghai kaj Tibeto. En multaj lokoj oni funkciigas E-kursojn kaj korespondajn lernejojn. Laŭ nekompleta statistiko, en la lastaj 10 jaroj ĉ. 400 000 homoj lernis Esperanton. En 1981 naskiĝis "La Mondo", organo de ĈEL (la malnova nomo de tiu en la 30-aj jaroj). Nun en Ĉinio estas dekoj da Esperantaj ĵurnaloj. En 1981 fondiĝis la Ĉina Esperanto-Eldonejo, kiu ĉiujare eldonas meznombro 20 specojn da libroj. Ankaŭ lokaj asocioj eldonas Esperantajn lernolibrojn, vortarojn kaj lega-



Chen Yi (la unua de maldekstre), Hujucz (la dua de maldekstre) kaj Chu Tunan (la tria de maldekstre) sur la podio de la Unua Tutlanda Labor-kunveno de Esperanto

jojn. En 1985 okazis en Kunming la Unua Ĉina Kongreso de Esperanto, kiun partoprenis pli ol 600 esperantistoj. La kongreso mem estis revuo de la fortoj de la ĉina Esperanto-movado. Ekde 1978 ĈEL ĉiujare sendis delegacion al Universala Kongreso. En 1980 ĝi aliĝis al la Universala Esperanto-Asocio. En 1986 sukcese okazis en Pekino la 71-a UK, kiun partoprenis pli ol 2 000 ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj. En tiuj jaroj diverslandaj esperantistoj foje refoje venis en Ĉinion por vizito kaj turismo. La ĉina E-movado tiam senprecedence disvolviĝis.

## NOVA TURNIĜO

En du jaroj post la 71-a UK, iagrade malvigliĝis E-aktivado kaj silentis iuj lokaj E-organizoj. Iuj, kiuj lernis Esperanton kun fantazio kaj fanatikeco, forlasis Esperanton aŭ malproksimiĝis de ĝia aktivado, ĉar en la socio, kie la konkuro intensiĝas tagon post tago, oni preferis sin okupi pri la aferoj pli intimaj al iliaj propraj interesoj ol malŝpari multe da tempo kaj energio por fari aferon ne multe enspezigan. Tamen nemalmultaj el ili daŭre tenas simpatian al nia lingvo, ĉar la sincera amikeco inter esperantistoj kaj la scenoj de ilia gaja renkontiĝo ankoraŭ ne forviŝiĝis el ilia memoro.

Fakte en la granda disvolviĝo de nia movado aperis aroj da oferemaj esperantistoj, kiuj ne nur amas nian lingvon, sed ankaŭ volentas labori por ĝi. Kvantam ankaŭ ili iam embarasiĝas, ĉagreniĝas kaj hezitas, tamen ili ankoraŭ daŭre strebas, esploras kaj firme tenas la pozicion de Esperanto. Ili spontanee okazigis konferencon pri la disvolviĝo de la ĉina E-movado, utiligante ĉiun okazon por studi kaj esplori la novan vojon por disvolvi E-movadon.

En junio 1988, ĈEL okazigis plivastigitan kunvenon de sia konsilantaro, prezidatan de s-ro Chen Yuan, la nuna prezidanto de ĈEL. En la kunveno oni ellaboris la politikon de E-movado en la nova periodo: meti la atenton ĉefe al la enlanda E-movado, konsi-



Partoprenantoj de la Dua Tutlanda Labor-kunveno de Esperanto

derante la tutmondan situacion, per Esperanto servi al la reformo, pordmalfermo, moderniga konstruado, spirita kaj materia civilizacio de Ĉinio kaj pli multe kontribui al la amikeco inter diverslandaj popoloj kaj al la paca kaj kvieta internacia medio. La politiko montris la direkton de la ĉina E-movado kaj estis aprobita de la ĉinaj esperantistoj. Dank' al tio, la ĉina E-movado prezentis iom post iom novan aspekton.

En la lastaj jaroj, esperantistoj de la marborda urbo Qingdao, Shandong-provinco, multe laboris por plivastigi la influon de Esperanto. Estas menciinde, ke ilia laboro estas simpatiata kaj subtenata de gvidantoj de la urba registaro, kiuj opinias, ke Esperanto estas utila por la pordmalfermo, konstruado kaj disvolvigo de la urbo. Subtenate de la urba registaro, la Qingdao-a E-Asocio filmis instruajn televidfilmon "Espero" kun dialogo kiel la ĉefa rimedo. Nun la televidfilmo estas elsendata de la Centra Televido al la tuta lando. Ili ankaŭ akiris aprobon por okazigi en Qingdao la 5-an Pacifikan Kongreson de Esperanto. Nun ne nur esperantistoj, sed ankaŭ koncernaj departementoj de Qingdao faras preparadon por la kongreso en 1992.

Sub la aŭspicioj de la urba registaro, ankaŭ la urbo Tai'an, Shandong-provinco, kie staras la fama Taishan-monto, kune kun Pollando filmis du filmojn en Esperanto pri Taishan-monto kaj aspekto de la ĉina kamparo. Ili nun estas distribuataj tutmonde.

Nun ĉiuj urbaj registaroj de Shandong-provinco rigardas E-laboron kiel la sian. Ili fervore helpas la E-asociojn en solvo de malfaciloj kaj disvolvo de laboroj.

En Hainan-provinco, unu el la specialaj ekonomiaj distriktoj, la provinca E-asocio, profitante de la favoraj lokaj kondiĉoj, uzas Esperanton ĉefe en ekonomia konstruado kaj komercado. Nun ĝi funkciigas entreprenon financitan kun alilandaj komercistoj, konsultan servon, korespondan E-kurson specialan por ekonomia kaj komerca fako. La Sciencista-Teknikista

E-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj 3-foje okazigis la Internacian Akademian Konferencon pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto, per kio ĝi faris sian kontribuon al apliko de Esperanto en la kampo de sciencoj kaj teknikoj. En 1989 en Xi'an okazis la Ĉina E-turisma Simpozio, en ĝi oni diskutis pri E-turismo. En 1990 en Tianjin okazis la E-Seminario pri Ĝemelurba Interfluo, en ĝi la ĉeestantoj el diversaj lokoj interŝanĝis siajn spertojn. Kvankam tiuj aktivadoj ne havis tiel vastan influon kiel en la lastaj jaroj, tamen ili montris, ke la ĉina E-movado iras antaŭen per firmaj paŝoj.

## ANKAŬ ESPERANTUJO BEZONAS REFORMON KAJ PORD-MALFERMON

En la pasintaj 40 jaroj la ĉina E-movado konis kelkajn malsukcesojn. Sed post ĉiu malsukceso ĝi pli multe disvolviĝis. Tio pruvis, ke Esperanto havas fortan vivipovon. Kiam la reformo kaj pordmalfermo alportis bonan ŝancon al nia lando, ni rimarkis, ke la lingvoj angla, japana kaj franca multe kontribuis al la modernigo de nia lando, sed Esperanto ne ludis sian rolon. Mi pensas, ke en la tagoj, kiam Esperanto servos al la reformado kaj pordmalfermo, ĝi certe montros sian potencon vivecon. El tio ni konkludis, ke ankaŭ Esperantujo bezonas reformon kaj pordmalfermon. L. L. Zamenhof kreis Esperanton por servi al la tuta homaro kaj al la mondopaco. Esperantujo devas malfermi sian pordon al la socio kaj servi per Esperanto al la tuta socio, ekz., al turismo, ekonomia konstruado kaj komerco. Nur trovinte la kontribuon de Esperanto la socio aprobos, alte taksos kaj subtenos nian lingvon. Nur tiam Esperanto havos pli grandan disvastiĝon kaj populariĝon. La praktiko de la ĉina E-movado pruvis, ke la reformo kaj pordmalfermo estas tre utila por disvolvigo de E-movado. Pri tio ni estas fidoplenaj. ■

\* La aŭtoro estas aganta ĝenerala sekretario de ĈEL.



# Verda stelo brilas en Milvokio de Usono

**J**E la 14a de aprilo 1990, mi adiaŭis la ĉefurbon Pekino kaj flugis al la alia bordo de Pacifiko. Post 17 horoj de flugado mi atingis la plej grandan usonan urbon Novjorko. Laciĝo pro longa flugado detenis min de ekskurso en la pompa urbego, kaj mi tuj iris al mia celloko Milvokio, kie mi laboros kiel esplorvizitanto en la Milvokia Universitato de Viskonsino por ses monatoj.

## SUR ANONCTABULO

Mi ne povis akomodigi tuj al la ŝanĝiĝo de tempo kaj sendormis en la nokto. Sekvantan matenon mi ellitiĝis tre laca kaj iris kun dormemaj okuloj al la oficejo de la Lingvistika Fakultato de la Universitato por viziti la dekanon. Subite io verda sur la anonctabulo apud la lifto brilis kaj saltis en miajn okulojn: sur verda papero klare skribiĝas ESPERANTO, KONFERENCO KAJ KLASOJ EN MILVOKIO, VISKONSINO, JUNIO 25 — JULIO 1, 1990. Instruisto: Profesoro Ullman de la Fakultato de Hispana kaj Portugala Lingvoj. Mi do direktis min ne al la dekanon, sed al la oficejo de Profesoro Ullman.

## SUR LA PORDO DE PROFESORA OFICEJO

La oficeja pordo de Profesoro Ullman distingiĝis per du oficialaj dokumentoj pri Esperanto. Unu estas proklamo de s-ro Tommy G. Thompson, ŝtatestro de Viskonsino. Ĝi legiĝas jene: ... Ĉar la speciala helpa lingvo Esperanto estis iniciatita en 1887 por faciligi ko-

munikiĝon kaj amikecon inter la popoloj de la mondo; kaj ĉar Esperanto estis projektita ne por anstataŭi ian ajn alian lingvon, sed por servi kiel dua komuna lingvo de la popoloj de la mondo, kiuj parolas proksimume 3 000 diferencajn lingvojn; kaj ĉar plibonigita interkomunikiĝo en diplomaciaj, komercaj kaj personaj aferoj povas esti potenca faktoro por konservi pacon, amikecon kaj bondeziron tra la mondo, tial nun mi, Tommy G. Thompson, ŝtatestro de Viskonsino, proklamas 18-24 de februaro 1990, kiel AMIKECAN SEMAJNON en Viskonsino, kaj mi instigas ĉiujn civitanojn kuniĝi kun la Internacia Amikeca kaj Bondezira Societo kaj la Universala Esperanto-Asocio en celebrado de ĉi tiu ceremonio.

La alia estas proklamo de urbestro John O. Norquist de Milvokio. Li kredis, ke Esperanto pontigos la fendegon de komuniko kaj kompreno inter ĉiuj popoloj, kaj proklamis, ke la INTERNACIA AMIKECA SEMAJNO de Milvokio koincidu kun tiu de la ŝtato.

## "ESPERANTO" SUR AŬTOBILLO

Je la 20a de majo, Profesoro Ullman veturigis min al la hejmo de sinjoro Milani por ĉeesti kunsidon de lokaj esperantistoj. Tie mi vidis aŭtomobilon, sur kies tegmento okulfrape skribiĝas: ESPERANTO, LA DUA LINGVO POR ĈIUJ. Kiel brila ideo! Oni kutime diras, ke la tuta Usono estas sur la radoj de aŭtoj. Kaj usonanoj pasigas multan tempon en siaj aŭtomobiloj. La saĝa esperan-

tisto utiligas sian aŭtomobilon por diskonigi nian lingvon. Poste mi trovis ankaŭ aliajn aŭtojn kunportantajn similajn, sed ne tute samajn vortojn pri Esperanto. Mi esperas, ke pli kaj pli multe da usonanoj sekvu iliajn aŭtomobilojn al Esperantujo.

## EN HEJMO DE VETERANA ESPERANTISTO

La kunsidon ĉeestis ses esperantistoj. Post interkonatiĝo sinjoro Milani demandis min: "Ĉu vi ĉeestis la 71an Universalan Kongreson de Esperanto en Pekino?" Jesante, mi elprenis la Kongresan Libron kaj montris la Adresaron: "Mia numero estas 1932." "Mia numero estas la lasta en la Adresaro," diris sinjoro Milani. Mi rapide foliumis ĝis la lasta numero, tie klare skribiĝas: (2115) Milani, s-ro Ali A.... Tio tuj intimigis nin. Ni ĝoje rememoris la Universalan Kongreson kaj ekskursojn al la Granda Muro, Imperiestra Palaco ktp. Ni multe parolis ankaŭ pri la Esperanta movado en Ĉinio kaj Usono. Sinjoro Milani montris al ni verdajn stelojn en diversaj grandoj kaj formoj, kolektitajn de li, kaj leteron, skribitan de Lidia Zamenhof al li, kaj regalis nin per teo, kafo kaj bongustaj kukoj. Li ofte gastigas lokajn esperantistojn en sia hejmo.

## EN ESPERANTA KURSO

Aŭskultinte la lecion "Lingvo kaj Socio" en la angla lingvo, mi estis hastanta al mia loĝejo por tagmanĝo. El la Verda Halo aŭdiĝis kanto "Esperanto Estas la Lingvo por Mi", kiu altiris min en



La aŭtoro (maldekstre) kaj usonaj samideanoj

la halon. Mi sidiĝis en la lasta vico. Tiutage la elementa kaj la mezgrada kursoj kune lernis Esperantan kanton. Mi sentis la melodion speciale bela kaj la voĉojn de la kursanoj tre dolĉaj. La kanto esprimas la verajn sentojn de esperantistoj. Forgesante malsaton, mi ekkantis kun ili. La harmonia ĥoro kortuŝis junan ĵurnalistinon sidantan antaŭ mi. Ŝia plumo rapide kuris sur papero por noti la emocian scenon kaj prezenti ĝin al ŝiaj legantoj.

## EN ESPERANTA KONFERENCO

La Esperanta Konferenco de Meza kaj Okcidenta Usono okazis je 29 junio — 1 julio 1990, en la Verda Halo de la Milvokia Universitato. Ĝin ĉeestis 31 usonaj geesperantistoj, kaj 1 pola Profesoro-esperantisto Leszek Kordylewski kaj mi. Laŭ peto de la Esperanto-Societo de Viskonsino mi faris prelegon "Esperanto kaj Mia Hejmurbo Harbino".

Antaŭ la prelego mi anoncis, ke mi ricevis leteron de la Redakcio de EPĈ antaŭ du tagoj, kiu petis min transdoni sinceran gratulon al la Esperanta Konferenco, kaj montris la leteron kaj la foton en la n-ro 1, 1990, *El Popola Ĉinio* "Laborantoj de la Redakcio de

EPĈ Salutas la Legantojn". La ĉeestantoj varme aplaudis, ĉar multaj el ili estas legantoj de EPĈ. La gratulo de malproksima EPĈ alportis neatenditan ĝojon al la konferenco.

Post mia prelego la geesperantistoj petis min paroli plie pri la Televida Esperanta Kurso, la Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto, Esperanta turismo, instruado de Esperanto en lernejoj kaj aliaj interesaj temoj pri ĉina Esperanta movado.

## SINDONEMA PERANTO DE EPĈ

En la kunvenejo la gesamideanoj multe favoris la Libroservon, kiu vendis ne nur Esperantajn eldonaĵojn, sed ankaŭ diversajn objektojn kun la vorto "Esperanto" kaj verda stelo. El Esperantaj eldonaĵoj ĉinaj bildorakontoj estis plej bonvenaj, kaj ankaŭ *Ĉina Antologio (1919-1949)*, *Noveloj de Lusin* kaj *Verda Majo* estis ŝatataj. La libroservon mastris sinjoro Bern Wheel. Li diris al mi, ke li laboris kiel peranto de EPĈ jam 12 jarojn. Por la Esperanta Libro servo ĉiujare li devas malgajni ĉirkaŭ 1 000 usonajn dolarojn, kvankam estas rabato en aĉeto de Esperantaj eldonaĵoj. Ta-

men li opinias la perdon inda por nia movado. Li diris al mi ankaŭ, ke usonaj geesperantistoj tre ŝatas EPĈ pro ties belaj bildoj. Ricevinte novan numeron, iuj legas ĝin de la komenco ĝis la fino. En la kunvenejo mi vidis kelkajn ĉeestantojn pleningantaj abonilojn de EPĈ.

## DILIGENTA ESPERANTA TRADUKANTO

En la kunvenejo mi renkontis junan esperantiston Doug Portman el Ilinojso. Li povoscias Esperanton, la anglan, germanan kaj hispanan lingvojn kaj dediĉis multan tempon al tradukado de plurlingva kemia terminaro. Mi partoprenis en la tradukado de Esperanta-Ĉina Vortaro kaj bone scias, kia peniga laboro ĝi estas. Ĝi postulas paciencon, energion kaj persistemon. En la lastaj jaroj li dronis en traduko de biokemia lernolibro el la angla lingvo en Esperanton.

## BANKEDO EN ĈINA RESTORACIO

En vespero de la 30a de junio la Esperanto-Societo de Viskonsino invitis ĉiujn ĉeestantojn de la Esperanta Konferenco al bankedo en ĉina restoracio. Samideanoj de tri landoj en malsamaj Esperantaj niveloj libere interparolis kiel en sama familio. Regis amikeca atmosfero. De tempo al tempo eksplodis ridegoj, kaj la kameraoj kaptis la ĝojajn scenojn. Komuna lingvo, sama ideo kaj sama espero intimigis homojn de malsamaj nacioj, aĝoj, seksoj kaj profesioj. Kiel nova esplor-vizitanto en Usono, mi sentis, ke estas iom fremdaj al mi la kulturo, moro, gastronomio kaj medio, sed tiutage, ĝuante bongustajn ĉinajn pladojn en gaja Esperantujo, mi sentis min tute hejme. Vere neforgesebla vespero por mia tuta vivo! ■

\*La aŭtoro estas vicprofesoro de la Harbina Politekniko de Ĉinio.



# Vi ne foriris, kara Brigitte!

**S**I, kara, afabla sinjorino Brigitte Frank-Böhringer, tro frue forlasis nin dum sia nur 54-a vivjaro!

Estis iu somera vespero antaŭ unu jaro. Mi la unuan fojon vidis ŝin en stacidomo Paderborn. Ŝi salutis min kun ĉarma rideto kaj varme gastigis min en sia hejmo. Kun granda plezuro ni interbabiladis pri diversaj temoj en Esperanto. Mi eĉ forgesis, ke ŝi (aŭ mi) estas alilandano. Ŝi estis tiel humora kaj sincera. Pro ŝi mi decidis resti en Paderborn kaj forlasis la eblecon iri al Usono.

Dum la monatoj, kiam mi laboris ĉe la sekretariejo de AIS, ŝi tiel bonkore prizorgis mian vivon kiel patrino. Foje mi faris etan vojaĝon al alia urbo, ŝi preparis por mi panon kaj bananon por la vojaĝo kaj persone ŝoforis min al la stacidomo. Ŝi eĉ ofte helpis min lavi la vestojn.

Pro ŝia gastamo ofte sciencistoj, instruistoj kaj artistoj el multaj landoj ĝuis en Paderborn horojn stimulajn kaj serenajn.

La publika agado de Brigitte Frank-Böhringer konsistis ekde 1967 ankaŭ en la redaktado de "Zentralblatt" de la siatempa Societo pri Programita Instruado (SPI-nun: Societo pri Pedagogio kaj Informado), kies en-



S-ino Brigitte Frank-Böhringer

kaj eksterlandajn konferencojn ŝi — pro petegoj kelkfoje eĉ prelegante — ofte partoprenis, pli malfrue en la organizado de la planlingva resumara aldono "Homo kaj Informo" al la jarvolumoj 1975-1980 de nia revuo, en la realigado de la Eŭropa Kalendaro, kiun ŝi ekevoluigis en 1977 por la Societo pri lingvolimtranspasa eŭropa interkompreniĝo (Eŭropa Klubo), kaj fine ankoraŭ en la eldono de la unua volumo de "Acta Samaritensia Academiae Scientiarum Internationalis" aperinta por la jarkomenco de 1990. El ŝia unua publikaĵo, la libro "Rhetorische Kommunikation"

aperinta en 1963, por kiu ŝi prilaboris la rezultojn de la retorika laborrondo de la Teknika Universitato Stuttgart konsiderante la informpsikologion kaj semiotikon, partoj intertempe estas represitaj eĉ en la lernejaraj libroj. Per sia lasta libro, aperinta en 1985, ŝi dokumentis "Ekestoj kaj celoj de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino".

En la jaro 1974 ŝi eklernis Esperanton kune kun la familio. Ĝis 1989 ŝi multe partoprenis kongresojn kaj konferencojn en kaj ekster Eŭropo. Ŝi bone rememoris la 71-an UK en Pekino (kaj kompreneble ankaŭ la ĉinan manĝaĵon).

Nur kelkajn tagojn antaŭ sia eniro en hospitalon ŝi kunportis belegan florantan rododendron por mia nova loĝejo. Neatendite, ĝi estas jam la lasta memoraĵo de ŝi. Kun malfeliĉo kaj doloro mi plantis ĝin en la ĝardeno antaŭ mia loĝejo, ĝi estas kiel kara sinjorino Brigitte, kiu donacis al ni tiom da belaj rememoroj.

Ŝia ĉarma rideto, ŝia belakanto, ŝia bonkoreco kaj helpemo ĉiam restos en nia memoro. Kvankam la korpo estas for, tamen ŝia animo vivas ankoraŭ, ŝi restas ankoraŭ inter ni. Kara Brigitte, via amikaro ne forgesos vin!

## ESP-NOVAĴOJ

● Lastatempe la Guangdong-a Alteduka Eldonejo eldonis libron pri populara scienco por esperantistoj, verkitan de Ye Shuzi, supera inĝeniero kaj vicprezidanto de la Guangdong-a E-Asocio.

● Memore al la 21-a Monda Poŝta Tago, la Poŝt-telekomunika Buroo de la urbo Jiangmen, Guangdong-provinco, emisiis poŝtkarton kaj uzis memoran stampilon en Esperanto kaj la ĉina lingvo, projektitan de Xie Shaoxing la 9-an de oktobro, 1990.

● En la lastaj du jaroj la Yuxi-a Agronomia Kolegio de Henan-provinco funkciigis nedevigan kursion de Esperanto, kiu estas multe ŝatata de instruistoj kaj studentoj de la kolegio. 117 studentoj lernis Esperanton tie en 1990.

● En oktobro de 1990, s-ro Wang Dong, vicprezidanto de la Shaanxi-a E-Asocio forpasis en Xi'an, en sia aĝo de 65 jaroj. S-ro Wang estis vicestro de la Xi'an-a Mediprotekta Buroo. En sia juneco li lernis Esperanton en Yan'an. En 1980 li ekfunkciis kiel vicprezidanto de la Xi'an-a E-Asocio, poste kiel vicprezidanto de la Shaanxi-a E-Asocio.

● *Interligilo* organo de la Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio raportis en sia 2-a numero de 1990 pri la memorkoverto kun stampo en Esperanto por la 40-jara jubileo de El Popola Ĉinio emisiita de la Pekina Poŝtmarka Kompanio en la 1-a de majo, 1990.

● *Verda Lupeo*, organo de Esperanto-Ligo Filatelista/Amika

Rondo de Esperantaj-Kolektantoj raportis en sia 2-a numero de 1990 pri la memorkoverto kaj stampilo en Esperanto por la 40-jara jubileo de El Popola Ĉinio. En tiu ĉi numero ĝi raportis ankaŭ pri 26 stampiloj en Esperanto faritaj de diversaj lokoj de Ĉinio memore al Zamenhof, Norman Bethune, Verda Majo kaj Venlo Fon.

● Fine de oktobro, 1990, en la 6-a Sesio de la 2-a Konsilantaro de la Ŝanhaja E-Asocio, Wang Minhao, ĝenerala sekretario de la asocio, anoncis, ke septembre de 1991 okazos seminario kun la temo "Lusin kaj Esperanto".

● La Astura Esperanto-Asocio de Hispanio okazigis sian regionan E-Kongreson inter la 12-a kaj la 14-a de oktobro 1990 en Gijón. Ĉi tiu estis la tria el la ĉi-regionaj kongresoj de Esperanto post la okazintaj en la pasintaj jaroj en la urboj Navia kaj Avilés.

D-ro Antonio Alonso Núñez, prezidanto de la Hispana Esperanto-Federacio, faris en la kongreso prelegon titolitan "Ĉu nova homa rajto? La rajto je komunikado". Dum la kongreso ne mankis folkloro spektaklo, ekskurso tra la ĉirkaŭaĵoj de Gijón kaj vespermanĝo laŭ la tipe astura kutimo.

● Urala Esperantista Societo (UES), Asocio de Internaciaj Junularaj Iniciatoj, Sverdlovsk Regiona Komitato de VLKSM kaj Eldon-entrepreno "Liga" kune organizos Internacian Esperantistan Renkontiĝon de Eŭropo-Azio inter 6-14 julio 1991 en Uralo. La ĉeftemo de la ren-

Membroj de la Astura Esperanto-Asocio en Gijón, 1990



Hungaraj Esperantaj poŝtstampoj

kontiĝo estas **ORIENTO-OKCIDENTO**: Kio komuna? Kio malsama? Kio kunigas? Kio disiĝas? Ĉu du civilizoj aŭ du branĉoj de la civilizo? Kia rolo por Esperanto? Detalajn informojn petu de SU-620077 Sverdlovsk, 77 ab. ja. 67 USSR.

● Jus aperis la nova **KATALOGO DE HUNGARLANDAJ ESPERANTAJ POŝTSTAMPOJ** en la dua ampleksigita eldono kaj entenas ankaŭ la tutaĵojn el jaroj 1933, 1935, 1937 kaj unuataĝajn kovertojn. Prezo: 7 int. resp. kup. + 1 por afranko, aŭ 3 USD/inkl. la afrankon, / aŭ egalvaloro. Vilmos Radnai, Hungario DUNAHARSZTZ, Bajcsy-Is. 104.

● Internacia Fervoja Esperanto-Federacio starigis Internacian Korespondan Servon ekde la jaro 1975. Se vi deziras utiligi la servon, bv. indiki vian nomon, aĝon, adreson, en kiuj landoj vi deziras gekorespondantojn, pri kiuj temoj, kaj ĉion pri vi mem kaj pri viaj deziroj. Se eblas, aldonu internacian respondkuponon, kaj turnu vin rekte al: P.I. Germano Gimelli, Via Donato Creti n 61, I-40128 Bologna, Italio.

### Solvoj por la bildengimjo

- A: Kravata banto kunpremita de la pordo de lifto  
 B: Dikulo fumas pipon en mola lito.  
 C: Nuda infano kolektas konkojn sur strando.  
 D: Porko elŝovas sin el nebulo.





# Longvivuloj en Pekino

Teksto kaj fotoj de WEI LIAO

Guo Biru

Guo Biru kaj ŝia 76-jara filino

En vintra sunumado





Guo Biru kaj ŝiaj gefiloj

Antaŭ 2 200 jaroj la Unua Imperiestro de Qin-dinastio ĉie adorkliniĝis al budhos-tatuo por vivi eterne. Tamen li mortis en la aĝo de 49 jaroj.

Antaŭ kaj post li sennombraj suverenoj klopodis serĉi vojon por plilongigi sian vivon. Tamen neniu el ili povis vivi ĝis la aĝo de 100 jaroj.

Kiamaniere plilongigi la vivon? Kio estas la vera vojo por plilongigi la vivon?

Farinte censon lastatempe, oni trovis, ke en Pekino vivas 40 maljunuloj en la aĝo de pli ol 100 jaroj. Ili havas malsamajn dietojn, kiaj vianda, vegetara, dolĉa kaj sala. Inter ili iuj ofte ekzercas la korpon eksterdome kaj aliaj ŝatas resti hejme.

Mirindas, ke la 106-jara Guo Biru, la dua grandaĝa longvivulo en Pekino, ĉiumon-ate manĝas 5 kg da sukero kaj sukeraĵoj.

Taŭga preferaĵo estas ĉiam rigardata kiel la ĉefa faktoro de longviveco. La dieto de la supre menciita maljunulino perpleksigas la fakulojn.

Mi intervjuis ŝin kaj trovis, ke ŝi estas alirebla kaj grandanima. Ŝiaj pli-ol-70-jaraj filino kaj bofilo estas superaj intelektuloj kaj bone flegas ŝin. La familio vivas en granda harmonio. La maljunulino estas purema. Ĉiutage ŝi kombas al si la harojn kaj purigas la tablojn kelke da fojoj. Kvankam la 40 maljunuloj havas malsamajn pre-ferojn, tamen ili estas laboremaj kaj intimaj al siaj familianoj. Eble en tio kuŝas la ĉefa kaŭzo de longviveco.





### NOVAJ DOMOJ SUR STEPOJ

La tradiciaj jurtoj estas oportunaj, facile transporteblaj kaj uzeblaj por mongoloj paŝantaj sur stepoj de generacio al generacio. Sed nun malofte videblas blankaj jurtoj sur la senlimaj stepoj Hulun Boir kaj Korsin de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Kien malaperis la jurtoj?

En la lastaj jaroj paŝtistoj sin turnis al la agrikultura produktado, ekspluato de virga tero kaj funkciigo de familia farmejo. Iuj entreprenas komercon aŭ aliajn laborojn, tial la jurtoj ne adaptiĝas al la bezono de la nova vivo. Kiel han-oj ili konstruis domojn el adoboj kaj fariĝis novtipaj kamparanoj, aliaj konstruis brikajn domojn kaj triaj transloĝiĝis en malgrandajn etaĝdomojn. Eĉ tiuj, kiuj nun ankoraŭ estas nomadaj paŝtistoj, ricevis komfortan fiksan loĝejon pro multiĝo de la enspezo kaj krome havas po unu aŭ du adobajn domojn en paŝtejo, kie ili paŝtas printempe kaj somere. Jam 9 600 el la 12 000 paŝtistaj familioj de la subregiono Hulun Boir adiaŭis la jurtojn.

El la ĵurnalo "Renmin Ribao"

### PONTO KUN PLEJ MULTE DA ARKAĴOJ EN ĈINIO

La ponto "Trezora Zono" en Suzhou, Jiangsu-provinco, estas ŝtona ponto kun plej multe da arkaĵoj en Ĉinio. Ĝi, kun totala longo de 317 m., larĝo de 4 m. kaj 53 arkaĵoj, kuŝas super Daidai-rivero, alfluanto de la Granda Kanalo inter Suzhou kaj Hangzhou. Tiom da arkaĵoj estis precedenco en la historio de la ponto-konstruado en Ĉinio. Ĉiu arkaĵo larĝas meze 4.6 m., la plej larĝa havas 6.95 m. kaj la plej mallarĝa 3.6 m. Ĉiu arkaĵo estas traveturebla por boato. Pro la longeco de la ponto kaj multeco de la arkaĵoj ĝia planko ne deklivas, kio estas oportuna al irado. Kiam okazas superakvo, la arkaĵoj povas tuj dividi ĝin. El tio oni povas vidi la saĝon de la projektinto.

La ponto estis konstruita en la jaro 819. Por kontentigi la ĉiam kreskantan bezonon de grentransportado sur la rivero, Wang Zhongshu, gubernatoro de Suzhou, decidis konstrui ponton en tiu loko. Tamen la kosto por tiel granda konstruado estis tre alta. Tial li iniciatis kampanjon de mondonaco kaj malavare donacis sian hereditan trezoran zonon. Sub lia instigo multaj riĉuloj kontribuis unu post alia, kaj fine

li kolektis sufiĉe da mono kaj sukcese konstruis la ponton en 3 jaroj. Por rememorigi pri li, oni nomas la ponton Trezora Zono.

El la gazeto "Turismo"

### INTERESA STRUKTURO DE LA ĈINAJ IDEOGRAFIAĴOJ

La Formo de plejparto de la ĉinaj ideografiaĵoj rekte ligiĝas kun prononco kaj senco. La ĉinaj ideografiaĵoj havas karakterizaĵon de semantika kaj fonetika analizoj. En Japanio infanoj lernas ideografiaĵojn kaj kanaon, tial neniam okazas la fenomeno kiel en Eŭropo kaj Ameriko, ke oni scipovas paroli, sed estas malfacile por li legi. Iu usonano opinias, ke literumado de anglaj vortoj estas malfacila por infanoj, kiuj suferas disleksion, tamen oni faris provon, ke tiaj infanoj legu ĉinajn ideografiaĵojn anstataŭ anglajn vortojn. Rezulte, ili progresis rapide, ĉar la formo de ĉinaj ideografiaĵoj bone konigas la sencojn. La esplorado de la usona fakulo montras, ke la ĉinaj infanoj estas pli inteligentaj ol la eŭropaj kaj amerikaj pro tio, ke ili lernas ideografiaĵojn. La ĉinaj ideografiaĵoj proksimiĝas al la tuj parolota, senvoĉa interna lingvo en la homa cerbo, kiu efike mallongigis la procezon de elekto de nocioj. Tio estas la ĉefa kaŭzo de rapida legado de ĉinaj ideografiaĵoj. Sed la latinaj literoj proksimiĝas al ekstera lingvo kaj perdis internan lingvon kaj multajn informojn.

La latinaj literoj estas facile analizeblaj kaj skribataj unudirekte antaŭen. Sed la ĉinaj ideografiaĵoj estas skribataj plurdirekte: supren kaj malsupren, dekstren kaj maldekstren, internen kaj eksteren. Tio povas sufiĉe disvolvi la homan kapablon kapti informon en diversaj direktoj. Skriba lingvo servas al okuloj. Kaj la formo de la ĉinaj ideografiaĵoj estas utila por rapida trarigardo. Estas tre klaraj la ĉinaj ideografiaĵoj kaj ilia tridimensia formo respondas al la vid-fokuso de la homoj kaj ĉiu kvadrato falas ĝuste sur la rondan retinon. La informokvanto de ĉinaj ideografiaĵoj en ĉiu fokuso superas tiun de la samgranda fonetika formo. Tio faciligas la tralegadon de la ĉinaj ideografiaĵoj kaj profundigas impreson pri ili. Samtempe, la meza nombro de strekoj de ofte uzataj ĉinaj ideografiaĵoj estas 7, aŭ iom pli aŭ iom malpli. Ĝi egalas al la konstanto de la homa memorado en mallonga tempo kaj utilas al reapero de la kompleta formo de la ĉinaj ideografiaĵoj.

El la ĵurnalo "Renmin Ribao"





# Ĉinaj virinoj

Teksto de LIANG ZHIWEI

Fotoj de LI CHUNGENG

*La ĉinaj virinoj estas nemankigebla forto de diversaj entreprenoj kaj gravaj membroj en familioj. Sube ni prezentos 6 malsamprofesiajn virinojn, kiujn nia raportisto intervjuis. Ni esperas, ke la artikolo halpos niajn legantojn bone koni la ĉinajn virinojn.*


La Red.

## REVEMA KNABINO

Bela kaj sagaca fraŭlino Ye Bin estas helpanto de direktoro de agentejo de alilanda komerca kompanio en Pekino. Ekde la 23-jaraĝo ŝi subskribis kontraktojn pri nego-  
co de metiartaĵoj por miliono da usonaj dolaroj. Tamen ŝi ne kontentigis kaj baldaŭ laboros en alia kompanio.

Ŝi tre ŝatas la libron "Toleremo" verkitan de la usona aŭtoro Hendrik van Loon. La libro rakontas, ke junulo loĝanta en kvietita valo kuraĝe transiris monton por serĉi pli novan teron. Ŝi volas senĉese

Ye Bin



serĉi novan verdan teron same kiel li.

Ŝi devenis de artista familio. Iam ŝi plendis, ke ŝia patro, kiu laboras kiel koregrafo, ne lasis ŝin fariĝi dancistino. Vidinte aliajn knabinojn sursceniĝi aŭ filmudi, ŝi sentis tikladon en la piedoj. Ŝia patro serioze diris al ŝi: "Eĉ mi, koregrafo, ne aprobas, por ne paroli pri aliaj."

La patro estis prava kaj ŝia plendo jam antaŭlonge kvietigis. Se ŝi okupiĝus pri arto, ŝi havus nur momentan sukceson kaj neniam kontribuus kiel nun. Ŝi flue parolas la japanan lingvon. Ŝi laboris en la agentejo malpli ol unu jaron, tamen ŝi jam povis bone plenumi la fakan laboron kaj ricevis specialan permeson subskribi kontraktojn. Ŝi elstaras inter la dungitoj de alilandaj entreprenoj en Pekino.

Pri amafero ŝi diris kun rideto: "En la okuloj de miaj kunlernantinoj ŝajne mi estas malplej solida. Multaj el ili edziniĝis tuj post diplomiĝo kaj iras firmaŝe. Sed la unua afero farita de mi estis disigi de mia amato. Mi konscias, ke ni estas naivaj kaj eĉ ne povas nin subteni. Ĉu tio povos konduki al feliĉo? Mi volas edziniĝi post plimaturiĝo."

Ŝi aldonis: "Mi havas alian deziron, ke iutage estonte oni prezentu televidan programon redaktitan de mi mem."

## SEKRETO DE VICDIREKTORINO

Zhu Yanyan estas vicdirektoro de Huayuanlu-magazeno en Pekino. La magazeno havas 180 laborantojn kaj vendas varojn de pli ol 20 000 specoj. Ĝia profito okupas la unuan lokon inter tiuj de la magazenoj de Pekino. Antaŭ nelonge Zhu Yanyan fariĝis vicdirektoro. Ŝi aĝas nur 27 jarojn, tamen la sukceso de la magazeno estas nedisigebla de ŝi. Tial ŝi estas respektata kaj amata de siaj kolegoj.

Kiam oni demandis ŝin pri la

Zhu Yanyan



sekreto de ŝia sukceso, ŝi senpripense respondis: "La penado de ĉiuj laborantoj kaj la harmonio de mia familio. Estas neimageble, kia mi fariĝus sen subteno de la familianoj."

Efektive ŝia feliĉa familio estas nedisigebla de ŝi. Ŝi respektas siajn bogepatrojn kiel siajn gepatrojn. Ŝia bopatrino diris, ke ŝia bofilino traktas ŝin pli bone ol ŝia filino."

La bopatrino de Zhu Yanyan suferas koronarian kormalsanon. Ĉiufoje, kiam la malsano atakas la bopatrinojn, Zhu Yanyan bone fleugas ŝin. Ŝi ĉiam kaj ĉiuflanke zorgas pri la vivo de la bogepatroj. Siavice la bogepatroj amas ŝin kiel sian filinon. Kiel ajn malfrue ŝi revenas hejmen, la bogepatroj senescepte atendas ŝin por kune preni la de ili preparitan manĝaĵon. Por ke Zhu Yanyan plenenergie laboru en la magazeno, la bogepatroj faras kiel eble plej multajn hejmlaborojn.

Zhu Yanyan kaj ŝia edzo amas, komprenas kaj prizorgas unu la alian. Menciante ŝian laboron, la edzo ĉiam diris: "Mi havas bonan edzinon, kiel mi povus ne subteni ŝian karieron!" Kaj en ilia familio neniam okazis malakordo. Ĉio ĉi ebligis al ŝi trankvile labori. "La tereno por virino estas kariero kaj familio. La familio estas la bazo de la kariero. Nur kiam la bazo fariĝas solida, la kariero povas evolui," ŝi diris.

### "MI ESTAS KAPABLA."

La 36-jara kuracisto He Bei estas memfida al ĉiuj aferoj kaj neniam kiel tiuj, kiuj renkontis malfacilon, senkonscie diris: "Kie bone estus, se mi estus viro."

He Bei estas la plej juna ĉefkuracisto de la sekcio de internaj malsanoj de la Tria Hospitalo sub la Pekina Medicina Universitato.

"Mi opinias, ke mi estas kapabla," ŝi ofte diras.

Foje la hospitalo importis spiratoron de tipo 900 C. Kvankam ŝi neniam uzis tian aparaton kaj funkciigi ĝin estis malfacile por ŝi, tamen sub alies helpo ŝi rapide el-



He Bei

lernis la manipuladojn. Antaŭe neniun gravan malsanulo vivis post uzo de la spiratoro. Sed nelonge post sia ekmanipulado ŝi kreis rekordon de la hospitalo. Ŝi donis lecionon ofte laŭ sia klinika sperto, kion laŭdis ŝiaj studentoj. Ŝi estis gajninto de la premio de klinikisto de la Pekina Medicina Universitato por 1989.

Iuj opinias, ke por kariero oni povas forlasi la familian feliĉon. Sed He Bei diris: "Mi volas kaj karieron kaj familion. Sukcesinto estas malfeliĉa sen familia feliĉo, precipe virino." Ŝi havas amatan edzon komprenantan kaj subtenantan ŝin kaj infanon naivan kaj amindan. Ĉiutage post laboro ŝi preparas por la edzo bongustajn pladojn kaj akompanas infanon en gaja ludo. Post la enlitiĝo de la edzo kaj infano ŝi ofte verkas disertajojn aŭ preparas lecionon ĝis profunda nokto. Ŝi diris: "Mi esperas, ke mi estos bona kuracisto en la okuloj de malsanuloj, bona edzino en la okuloj de la edzo kaj bona patrino en la okuloj de la infano. Mi opinias, ke mi estas kapabla."

### INSTRUISTINO KIEL PATRINO

La plej granda deziro de Cai

Weici estis fariĝi kuracisto, kiam ŝi enskribiĝis por trapasi altlernejan ekzamenon, eble pro tio, ke ŝi estis malsanema en la infaneco. Sed la sorto faris ŝin instruistino de elementa lernejo. Tio okazis en 1965. Tiam ŝi opiniis, ke oni malalte taksis ŝin, elstaran mezlernejan diplomiton, kaj ŝi nevolonte akceptis la laboron. Sed iom post iom ŝi vidis en la infanoj la valoron de instruisto de elementa lernejo, sekve ŝi verŝis la tutan patrinan amon sur siajn lernantojn.

Parolante pri la rolo de patrino, ŝi diris, ke ŝi ne estas perfekta patrino, ĉar ŝi pasigis malmulte da tempo kune kun sia filino.

Tamen ŝi dediĉis multajn horojn al siaj lernantoj. Antaŭ 10 jaroj ŝi instruis la ĉinan lingvon. Ĉiufoje ŝi devokonscie korektis la hejmtaskojn de siaj lernantoj. Tro da laboro lacigis ŝiajn okulojn. Jam en la aĝo de 35 jaroj ŝi ekportis presbiopajn okulvitrojn. Poste ŝi instruis matematikon anstataŭ la ĉinan lingvon kaj gvidis la matematikan instruadon de la lernejo. Ŝi devas prepari kaj doni lecionon, helpi postgintajn lernantojn, oka-

Cai Weici




zigi postlecionajn aktivadojn kaj krome doni konsilojn al junaj instruistoj. Ŝi diris, ke ĉiutage ŝi laboras streĉe, sentas lacegon kaj, re-






He Bei ekzamenas pacieron.

Fraŭlino Ye Bin en laboro





Cai Weici kaj ŝiaj lernantoj



Zhu Yanyan laboras en vendejo.

Lü Naiqin (sidanta) kaj ŝia kolego





veninte hejmen, sidas en sofo ne volante fari ion alian. Ŝia edzo diris, ke ŝia vivo estas seninteresa kaj ŝi havas nur tiun malgrandan terejon. Ŝi diris, ke fakte ŝi tre volas danci kaj ĝui muzikon, sed ŝiaj lernantoj des pli bezonas ŝin. En ŝia malgranda tereno ŝi estas senmezure gaja.

En ŝia klaso lernas 3 lernantoj, kies gepatroj eksedziĝis. Pro tio ili lernas malbone. Ŝi helpas ilin en lernado, solvas por ili malfacilajn demandojn kaj korektas iliajn erarojn. Ŝi diris, ke ŝi devas doni al ili patrinan amon, kiun ili perdis.

## MULTE DA MALFACILOJ EN MEZAĜO

“Kiam virino atingas 46-47 jarojn, ŝi ŝarĝiĝas de pezaj laboroj kaj zorgoj pri gefiloj kaj ŝia korpo komencas malfortiĝi.”

Tion diris Lū Naiqin, inĝeniero de projekta instituto de elektronika inĝenierio. Ŝia edzo estas ĉefprojektilisto de la instituto.

Ŝi estas ŝanhajano. Diplomiĝinte el universitato, ŝi eklaboris en fabriko de Ŝanhajo. En 1972 la instituto transloĝigis ŝin en Pekinon, por ke ŝi vivu kune kun ŝia edzo. Verdire, la vivkondiĉoj en Ŝanhajo estas pli bonaj ol tiuj en

Lū Naiqin



Pekino, tamen la laboro en la instituto povas multe altigi la laborkapablon. Sekve ŝi lasis sian filinon en Ŝanhajo kaj venis sola en Pekinon.

Ŝia hejmo distancas proksime de la instituto. Ŝi kaj ŝia edzo kun la fileto loĝas en apartamento el du ĉambroj en la 6-a etaĝo. Krom fari oficejan laboron, ŝi devas ankaŭ prepari manĝaĵojn trifoje ĉiutage. Por ŝpari tempon, ŝi aĉetas eĉ altprezajn legomojn en proksima vendejo. Ofte ŝi preparas manĝaĵojn en mateno por tagmezo. Tiutempe oni ankoraŭ ne liveris tubogason kaj ŝi uzis karbofornon de kelkaj jarojn.

Lū Naiqin kaj ŝia edzo okupiĝas pri inĝenieria projektado kaj ofte daŭrigas la nefinitan laboron hejme, tiel ke ili ne povas ĝui televidan programon. Kompreneble ŝi ĝojis, ke en la lastaj jaroj ŝi partoprenis teknologian projektadon de multaj grandaj elektronikaj konstruoj, plenumis nemalmultajn taskojn de faka konsultiĝo kaj studis unu jaron en alia lando.


Ŝi havas ankaŭ ĉagrenojn. Ekz. nun ŝi estas nur ordinara inĝeniero. Ŝia monata salajro estas nur iom pli ol 100 juanoj, malpli alta ol tiu de multaj samaĝuloj. Ŝia filino, 19-jara, studas en altlernejo kaj elspezas multe. Ŝia filo lernas en mezlernejo kaj des pli bezonas ŝian prizorgon. Kiam turmentas tede, ŝia tuta familio ekskursas al pitoreskejo...

## SUR LA LASTA POSTENO

Ŝi aspektas ne kiel 60-jarulo, sed efektive ŝi estas tiom maljuna. Antaŭ 5 jaroj ŝi forlasis sian oficejon, kie ŝi laboris multajn jarojn.

Ŝi nomiĝas Chen Yuanwei. Post kiam ŝi emeritiĝis, ŝi estis libera, ŝi do aĉetis monatan bileton por ĉiutage veturi per aŭtobuso de la unua stacio ĝis la lasta kaj poste revenis. Poste ŝi funkciis kiel estro de loĝantara komitato kaj ne havas tempon por distriĝi per aŭtoveturo.

Loĝantara komitato estas administracio de ĉinaj urbanoj. La loĝantara komitato, kiun ŝi estras, devas zorgi pri 6 etaĝdomoj kun



Chen Yuanwei

pli ol 400 familioj. Ĉion ŝi zorgas: amuza aktivado de maljunuloj, naskolimigo de virinoj, purigado de domoj, alporto de ĵurnaloj kaj lakto... kaj kiam tiu aŭ alia familio bezonas helpon, ŝi sin turnas al la loĝantara komitato. Ekz. kiam infangardenon ĝiaj infanoj vizitu, kiam servistinojn ĝiaj maljunuloj dungu. Foje en iun familion ŝi iris ŝtelisto, kion oni informis al la loĝantara komitato. Sub la gvido de la komitato oni ĉirkaŭis la domon kaj kaptis la ŝteliston.

En la loĝantara komitato oni malmulte perlaboras, sed multe laciĝas. Kompreneble oni bezonas subtenon de siaj familianoj. Ankaŭ la edzo de Chen Yuanwei emeritiĝis kaj bone mastrumas la hejmon. Ĉiutage li preparas manĝaĵojn por ŝi, kio liberigis ŝin de la hejmlaboroj. Ankaŭ iafaje ili kverelis pro bagateloj. Sed baldaŭ ŝi kvietiĝis. Ŝi diris, ke ankaŭ maljunaj geedzoj bezonas harmonion kaj plezuron. Ŝiaj 3 gefiloj ne loĝas ĉe ŝi, eĉ dum longa tempo ne vizitis ŝin. Ŝi diris, ke maljunuloj ŝatas kvieton. Iafaje ŝi volis vidi ilin, ŝi do telefonis al ili, ke ili revenu. Sed reveninte, ili malkvietigis la familion, kio tre ŝokis ŝin. Estas ĉina popoldiro “Maljunulojn akompanas iliaj gefiloj.” “Nun mi ankoraŭ povas prizorgi min mem,” ŝi diris. “Kiam mi tion ne povos, miaj gefiloj revenos por prizorgi min.” ■



S-ro Feng Qing

**E**N la okuloj de la ĉinoj la Nordo estas kruda. Ĝi ofte asociiĝas kun forta sabla vento freneze balaanta la teron. Sed samtempe ĝi estas milda. Kiam la leĝeraj neĝflokaj falas teren, ili tuj neniigas ĉion bruon kaj faras la mondon kvieta.

Tial la pentraĵo temanta pri neĝo, kiel poemo, estas same inspira.

En Ĉinio pejzaĝistoj estas multaj, sed neĝpentristoj estas malmultaj, inter kiuj ja estas juna Feng Qing. Ĉiuj, kiuj rigardis liajn olepentraĵojn, estas infektitaj de la delikata pentrarto kaj lirikismo. Oni diras, ke la verkoj spegulas la aŭtoron mem. Rigardante la pentraĵojn, oni nature imagis, ke ilia verkinto estas homo malforta kaj kvieta, sed la fakto estis tute mala al mia imago. Li estas altstatura, kun densa vanghararo, kaj parolas en forta akcento de la nordorientĉinia dialekto. Tio tre mirigis min kaj mi apenaŭ kredis, ke ĝuste tiu alta fortikulo verkis la belajn pentraĵojn.

La 35-jara Feng Qing devenis de pentrista familio en la Nordoriento de Ĉinio. Ekde la generacio de lia avo preskaŭ ĉiuj membroj de lia familio estas pentristoj. Tia familio ne nur havigis al li artan senton, sed ankaŭ donis al li sisteman klerigadon kaj metis por li solidan bazon por lia posta artista agado.

Sen stilo la arto estas senviva. Serĉi sian propran mondon estas celo de ĉiu artisto dum lia tuta vivo. Samkiel aliaj pentristoj, ankaŭ Feng Qing spertis kaprompan cerbumadon. En la cerbumado li rememoris sian hejmlokon regatan de neĝo kaj glacio,

## ARTOJ DE ĈINIO

# Neĝo, olepentraĵo kaj poemo

de CAO WEI


rememoris sian infanecon plenan de belaj revoj. Kun plena sento li diris: "En la infaneco mi vivis en la Nordoriento kaj pro tio mi aparte amas neĝon kaj iaforte tuj ĉe la okulfermo mi vidas blankajn neĝerojn, glaciajn stalaktitojn kaj glaciajn pendaĵojn. Ili estas neelĉerpebla fonto de la artoj." Ĝuste en sia hejmloko Feng Qing trovis sian artan fonton, animon de la nordlando — neĝon.

En la naturo neĝo estas blanka, blindiga, kiu tamen fariĝis blueta sub la penikoj de Feng. Kviete, milde kaj loze ĝi kuŝas sur la tero. Tial spektante liajn pentraĵojn, oni sentas, ke ili kvazaŭ estus pura loko pri poemoj kaj pentraĵoj en la brua mondo kaj konas la delikatecon kaj belecon latentajn en la profundo de la karaktero de la krudaj nordaĵoj.


Tiu arta animstato estas ne nur rezulto de la longatempa memkultivado de Feng Qing, sed ankaŭ la kristaliĝo de lia senĉesa strebado en la arto. Li iam diris: "Oni pensas, ke mi pentras neĝon, sed fakte mi pentras miajn proprajn songojn, la songojn en mia infaneco. Tial ĉiuforte, post kiam mi revenis de la neĝkovritaj Changbai- kaj Xing'an-montaroj, mi ne tuj komencis pentri, sed pripensis kaj asimilis tiujn impresojn ĝis kiam ili tute unuiĝis kun mia penso." Vere, s-ro Feng strebas ne al ekstera formo, sed al libera animo kaj medio en kiu oni forgesas kaj sin mem kaj la mondon. Sur liaj pentraĵoj oni trovas, ke li sin liberigis el la tradicia bunteco de la okcidenta olepentrado, kaj akcentis lakonecon de la koloroj kaj strukturo. Li vere faras ĉion eblan por atingi tian implicitan mondon, kie en unu floro oni vidas la homan vivon kaj en sablero la tutan mondon. Liaj pentraĵoj forme estas okcidentaj, sed esence orientaj.

Feng Qing estas nova stelo en la pentrista rondo de Ĉinio. Liaj verkoj vidiĝas ne nur en la Belarta Domo de Ĉinio, sed ankaŭ en la artaj galerioj de Japanio, Usono kaj aliaj landoj. ■






"Glacia pendaĵo sur arbobranĉoj"



"En frosto"

"En frua printempo"





“Neĝo sur arboradikoj”



“Hejmloko”



馮慶



**E**N la 11-a Azia Sportkunveno okazinta en Pekino en 1990, oni vidis, ke ĉinaj kaj alilandaj sportistoj kune akceptas bukedojn kaj pokalojn sur podio en varma hurado de spektantoj. Tamen, oni mal multe sciis, kiel peneme ili ekzercis sin por gajni konkurson. La ambicio kaj penemo de la ĉinaj sportistoj, precipe la serioza trejniĝo antaŭ la okazaĵo de la sportkunveno, rezultigis novan impeton de la sporta afero de Ĉinio kaj aperigis multe da elstaraj sportistoj sur la ĉina sporta kampo.

## KOLEKTIVA FORTO

En la azia sportkunveno Zhou Lingmei rompis la mondan rekordon de la virina 1-kilometra tempomezura biciklado. Kiam mi vizitis la biciklistan teamon, trejnisto de Zhou Lingmei diris al mi: “La monda rekordo estas kreita de la tuta teamo. La kolektiva forto sukcesigis ŝin.”

Kiam 14-jara Sun Shuwei aperis sur platformo alta je dek metroj, multaj spektantoj rigardis lin kun rideto. Tamen li estis trankvila kun mieno de “plenkreskulo”, facilmove iris al la rando de la platformo, etendis la brakojn, lerte saltis alten kaj senbrue falis en la akvon, ke la akveroj saltetis kaj tre baldaŭ malaperis. Je tio la spektantoj tondre aplaudis. Sun Shuwei gajnis la ĉampionecon de la sportbranĉo.

Sun Shuwei diris: “Kompreneble, mi tre ĝojas gajni la oran medalon en la azia sportkunveno. Por tio mi multe suferis de mia trejniĝo.”

En septembro 1989 li estis sendita el Guangdong al la Ĉina Plongista Teamo. La sportistoj estis streĉe trejnataj kvar monatojn en la Sporta Centro de Jinan en Shandong-provinco. Ĉiutage li la lasta ĉesis trejniĝi. Liaj manoj, piedoj kaj brakoj estis vunditaj, tamen li neniam forlasis sian trejniĝon. Rapide progresigis lin la pena trejniĝo.

“Antaŭ la azia sportkunveno ni fermito nin

ZHANG QINGZHEN:

# Elstaraj ĉinaj

Ĉinio estas “lando de bicikloj”, kie ĉiujare produktiĝas pli ol 35 milionoj da bicikloj kaj biciklascentoj da milionoj da homoj. De multaj jaroj la ĉinaj bicikladaj trejnistoj kaj sportistoj generacio post generacio penis por fari Ĉinion forta lando de biciklado en la mondo.

Zhou Lingmei diris: “Mian sukceson rekompencis pena trejniĝo.” Ŝia trejnisto diris: “Neordinara sukceso venas el neordinara trejniĝo.” La biciklista teamo neniam ripozas eĉ en dimanĉo kaj festotago. Ili diris, ke unutaga ripozo kaŭzas rimarkindan malaltiĝon de sporta tekniko. Ĉiutage ili ellitiĝas je la kvara en mateno por sin trejni. Ĉiutage sportistino biciklas 140 kilometrojn kaj sportisto 180 kilometrojn. Ĉiu sportisto biciklas almenaŭ la distancon de 47 000 kilometroj jare, kiu estas pli longa ol la perimetro de la terglobo.

Krome, la sportistoj ankaŭ ĉerpas sperton de alilandaj trejnistoj kaj fakuloj kaj el internaciaj konkursoj, kio rezultigis novan impeton de la biciklado de Ĉinio.

## ELSTARA INFANO-PLONĜISTO

trejnis unu monaton sur platformo de mateno ĝis vespero. Tiam ni estis tre lacaj. Vespere, ni dormis profunde, ke eĉ tondrado ne povis nin vekii,” Sun Shuwei diris. Li ne estis kontenta pri la ora medalo. Li havis novan celon gajni la mondan ĉampionecon.

## PLIAĜA NAĜISTINO

En la virinaj naĝ-konkursoj de la azia sportkunveno 32-jara Wang Xiaohong gajnis kvar orajn kaj unu arĝentan medalojn. En la finalo de la virina 100-metra papili-naĝado, ŝi kreis la azian rekordon de 58”87, kiu proksimiĝis al la monda rekordo kun la titolo “naĝa rekordo por la venonta jarcento” kreita de usona sportistino en 1981, kaj estis la plej bona atingo de la mondo tiuflanke en la pasinta jaro. Kiel diris la ĝenerala trejnisto de la Ĉina Naĝista Teamo, ŝi estas elstara pliaĝa sportistino.

La naĝistinoj de ĉiuj landoj plejparte fametas en sia 15-16-a jaro. Ekz., 16-jara usona sportistino gajnis la orajn medalojn de virinaj 400-metra kaj 800-metra libernaĝoj kaj 400-metra individua kvarpoza naĝo en la 24-aj Olimpikoj en Seulo. La ĉinaj naĝistinoj Qian Hong titolita kiel “reĝino de papilia

naĝo de Azio”, Huang Xiaomin titolita kiel “reĝino de brustonaaĝo”, Zhuang Yong, kiu tenas la azian rekordon de 100-metra libernaĝo, kaj Yang Wenyi, kiu kreis la novan azian rekordon de 100-metra dorsnaĝo. Ili ĉiuj estas pli junaj ol Wang Xiaohong.

Tamen, Wang Xiaohong kredis, ke ŝi certe sukcesos en naĝado. En kvin jaroj post kiam ŝi estis sendita al la ĉina teamo, kiel oni diris, ŝi naĝis la distancon eĉ pli longan ol ŝia irdistanco. Kun tempopaso pli kaj pli perfektigis ŝia tekniko de naĝado.

La penemo kaj persistemo de Wang Xiaohong estis rekompencitaj per sukceso. Krome, ŝi havas bonan trejniston Zhang Xiong, kiu estis esploranto-studento de la Pekina Sporta Instituto.

## DEZIRO EFEKTIVIGITA

“Mi finfine gajnis la oran medalon de stangosalto en la azia sportkunveno kaj per tio rompis la rekordon de tiu ĉi sportbranĉo de azia sportkunveno. Kaj

Li strebis por gajni la oran medalon de la azia sportkunveno kaj malpezigis je kvar kilogramoj post trejniĝo.

En la 2-a de oktobro, kiam li eniris la Olimpikan Spertejon, li estis iom kortuŝita. En la konkurso li



Sun Shuwei

sukcese transsaltis la altojn de 5.20 kaj 5.40 metroj. Kiam li transsaltis la alton de 5.50 metroj, li jam gajnis la oran medalon. Tiam la varma aplaŭdado forte kuraĝigis lin. Li decidis provsalti la alton de 5.62 metroj. Kiam li kuraĝe transsaltis la alton, li ekĝojis, ke lia ok-jara deziro efektiviĝis finfine.

## “BONEGE!”

“Mi tre ĝojas! Mi multe ĝuas! Ŝi sufiĉe forta!” Kiam Liu Huajin transkuris la finon, Ji Zheng, fama sportistino de Taibei, Ĉinio, starigis kaj aplaŭdadis por la “daŭriganto” de sia sportbranĉo.

# sportistoj


efektivigis mia ok-jara deziro,” diris ĝoje Liang Xueren en novaĵ-kunveno.

En la sekva jaro post kiam Liang Xueren eniris la Ĉinan Atletikan Teamon junio de 1982, Volkov, fama sovetunia stangosaltisto kaj la tenanto de la tiama monda rekordo, venis en Pekinon por partopreni la konkurson. Li transsaltis la alton de 5.60 metroj kaj gajnis la ĉampionecon. Tiam 18-jara Liang Xueren faris la decidon transsalti la alton kaj pluapaŝe superi ĝin.

En la postaj ok jaroj li diligente sin ekzercis por efektiviĝi la celon. En aŭgusto, la suno fajre brilis kaj la sportejo varmis kiel arda forno. Por kulturi en si persistemon kaj streĉe sin ekzerci li nudtorse saltis foje kaj refoje en la sportejo. Larmoj kaj ŝvitgutoj fluis de sur lia vizaĝo. Kiom suferiga trejniĝo!

Lia penado ne estis farita vane. En 1987 li transsaltis la altojn de 5.56 kaj 5.57 metroj kaj per tio renovigis la azian rekordon. En majo 1990 li unuafoje transsaltis la alton de 5.60 metroj kaj en la Tutlanda Atletika Ĉampionea Konkurso en junio, kiu estis ankaŭ kvalifika konkurso por la azia sportkunveno, li transsaltis la alton de 5.61 metroj.







Wang Xiaohong

Liu Huajin (meze)





Zhou Lingmei



Liang Xueren

Kiel speciale invitita raportistino de la Azia Televidstacio de Hongkong, Ji Zheng, antaŭa kreinto de la monda rekordo de 100-metra hurdokurado, venis viziti la azian sportkunvenon. Ĉe la konkurso Ji Zheng rakontis pri Liu Huajin.

“Malmulte mi sciis pri Liu Huajin. Post la ĉi-foja intervjuo kun ŝi mi kompare multe sciis pri ŝi. En 1986 ŝi falis en sportejo kaj vundis al si la maldekstran genuan artikon. Post operacio ŝi ne povis fleksi la gambojn. Tamen, en 1987, en la tutlanda sportkunveno ŝi rompis la azian rekordon, kiun mi tenis 17 jarojn. Dum kuracado en hospitalo ŝi malpezigis de 60 ĝis 49 kilogramoj. Preskaŭ ĉesis ŝia sportista

vivo. Tamen, en la lastaj kvar jaroj pli kaj pli leviĝis ŝia tekniko de kurado. Hodiaŭ ŝi refoje rompis la azian rekordon.”

“Mi konatiĝis kun Liu Huajin en la Azia Atletika Ĉampioneca Konkurso, okazinta en Ĝakarto en 1985. Post kiam ŝi rompis la rekordon en 1987, mi admiris ne nur ŝian sukceson, sed ankaŭ ŝian spiriton, tial ni fariĝis bonaj amikinoj. Mi opinias, ke la ĉi-foja konkurso estas ŝlosilo por la 28-jara Liu. Antaŭ la konkurso mi iris speciale al la trejnejo por kuraĝigi ŝin, ĉar estas la lasta fojo por ŝi partopreni en konkurso kadre de la azia sportkunveno.” ■



## EKONOMIO

● Novembre de 1990 la pasaĝer-aviadilo Yun 7-200B estis sukcese lanĉita. Ĝi estas projektita kaj farita de la Xi'an-a Aviadil-industria Kompanio en nordokcidenta Ĉinio.

La pasaĝer-aviadiloj Yun 7 konsistigas la plej grandan aerfloton de Ĉinio, kiu funkcias sur 100 branĉaj aerlinioj. Ili estas faritaj surbaze de la aviadiloj Yun 7-100 per alilandaj teknikoj kaj post reformo de la planeoj, fuzelaĝo, motoroj, helicoj, rad-ĉasioj kaj elektronikaj aparatoj, sume 93 partoj en 8 kampoj.

● La 10-an de dec. 1990, en Pekino estis subskribita la kontrakto pri kuna prospektorado, ekspluatado kaj produktado de petrolo, fare de la Ĉina Petrol-ekspluata Kompanio, energia kompanio de Usono kaj usona kaj novzelandaj petrol-kompanioj, en la baseno de Dongting-lago, Hunan-provinco.

La kontrakto estas grava frukto de la ĉina petrol-industrio surbaze de la principo sin apogi sur propraj fortoj en disvolvo de ekonomia kaj teknika kunlaboro kaj interŝanĝo kun aliaj landoj. Ĝi prezentis al pli da alilandaj petrol-kompanioj vastan perspektivon kunlabori en petrol-industrio de suda Ĉinio.

## SCIENCOJ KAJ TEKNIKOJ

● Ĉinaj sciencistoj unufoje en la mondo senpere observis novan formon — trioblan spiralon de desoksiribonukleata acido. Fakuloj opinias, ke tio estas alia grava malkovro en la naturo.

La acido estas la ĉefa materia bazo de la vivuloj por konservi, reprodukti kaj transdoni genetikajn informojn. Sciencistoj alte taksas ĝin en esploro pri la misteroj de la vivo.

● Ĝis nun la Pekina Observatorio, Yunnan-a Observatorio kaj Nankina Zijinshan-observatorio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj 22-foje faris ekzaktan prognozon de la suna movado por gravaj sciencaj eksperimentoj de Ĉinio, kia lanĉo de satelito kaj raketo. Tio markas, ke Ĉinio jam atingis interna-

cian avangardan nivelon en prognozo de la suna movado.

● La 19-an de nov. 1990, en Pekino oni metis bazon al la Esplor-centro de Rapida Reaktoro sub la Ĉina Akademio de Atomscienco. Ĝi estas grava konstruaĵo de Ĉinio por pace utiligi atomenergion.

La centro konsistas el eksperimenta konstruaĵo de rapida reaktoro kaj eksperimenta reaktoro. La lasta kun kapacito de 20 000 kilovattoj estos finkonstruita ĉ. la jaro 2 000 laŭ la plano. Tiam Ĉinio fariĝos unu el la malmultaj landoj posedantaj tian reaktoron.


● Ĉinaj geologoj konstatis, ke antaŭ 50 milionoj da jaroj giganta aerolito sin pafis de nordoriente al nia terglobo. Ĝi eksplodis kun forto 10-milionoble pli granda ol tiu de la atombombo ĵetita sur Hiroŝimon. La aerolita atako kavigis 2 300 kvadratajn kilometrojn. Tiel aperis Taihu-lago en la malsupra baseno de Yangzi-rivero.

Geologia grupo unufoje trovis proksime de la lago rokon atakitan de la aerolito.

● La Ĉin-medicina Akademio de Ĉinio fondis datenbankojn de ĉin-medicinaj medikamentoj kaj akupunkturaj-moksaj literaturoj. Dank' al tio, oni plenigis la blankon de la aŭtomata serĉado de la literaturoj de la ĉin-medicinaj medikamentoj.

Laŭ statistiko, nun en la mondo publikiĝas ĉiujare pli ol 20 000 artikoloj pri la ĉin-medicina farmacio, el kiuj 30-40% aperas en nefakaj gazetoj en malsamaj lingvoj. La fondiĝo de la du datenbankoj liberigis la sciencistojn kaj teknikistojn el la kompli-

Aviadiloj Yun 8C faritaj de la Aviadil-produkta Kompanio de Shaanxi



ka fizika laboro, tiel ke la kolekto, ordigo, konservo kaj livero de la ĉin-medicinaj literaturoj atingis novan etapon de industriigo kaj aŭtomatigo, kaj certe profunde influos la disvolviĝon de la ĉin-medicinaj medikamentoj kaj prosperiĝon de la sciencoj.

## KULTURO

- “Granda Vortaro de Han-lingvo” (8 volumoj entute), grava frukto en la kultura konstruado de Ĉinio, estas eldonita. Ĝi kun 54 678 ideogramoj estas la plej granda vortaro de han-lingvo en la mondo.

- La eldon-plano de “Klasifika Enciklopedio de la Ĉina Belarto” (400 volumoj), la plej granda eldonaĵo en la historio de la ĉina kulturo, estas ellaborita. Nun oni komencis la kompiladon.

Ĝi komplete kaj sisteme konigos la belartajn kuriozaĵojn de ĉiuj historiaj periodoj, kiuj daŭris de la lasta fazo de paleolitiko ĝis la fino de Qing-dinastio (1644-1911). La verko konsistas el 19 klasoj de pentrarto, skulpturo, metiarto, kaligrafio kaj arkitekturo.


- La videobenda kaseto de la granda dokumenta filmo “Historio de Yuanmingyuan” nun estas vendita en Pekino.

Yuanmingyuan estis la plej granda imperiestra ĝardeno de Qing-dinastio. Ĝi, simbolo de brilaj ĝardenistikaj sukcesoj dum 3 000 jaroj de Ĉinio, estis nomata “Reĝo de Ĝardenoj”. En 1860 la Brita-Franca Alianca Armeo forbruligis ĝin. Per abundaj historiaj materialoj kaj realaj planoj, la kaseto prezentas grandajn sukcesojn de Yuanmingyuan en ĝardenistiko, arkitekturo kaj belarto kaj montras la brilan antikvan kulturon de la ĉina nacio. La eldoninto de la videobenda kaseto diris, ke li kontribuos per la tuta enspezo de la kasetoj al la fonduso por ripari la ĝardenon.

- Antaŭ nelonge, en Pekino okazis ekspozicio de belartaĵoj kaj kuriozaĵoj de 22 amatoroj en Pekino kaj Ŝanhajo. Tie vidiĝis proks. dekmilo da valoraj objektoj de 20 specoj, kiaj ventumiloj, papilioj, teatraj kostumoj, ĉinaj mangbastonetoj, antikvaj inkfrotujoj, bildoj de ŝminkitaj vizaĝoj de pekina opero, kuriozaj ŝtonetoj, te-servicoj, budho-statuoj, skulptaĵoj en formo de rampuloj kaj insektoj, alumetaĵoj etiketoj, poŝtmarkoj, ŝlosilaj brelokoj kaj aŭtomodeloj.

## HIGIENO

- En 1990 Zhai Xinxin, 9-jara knabo de la urbo Xuchang, Henan-provinco, faligis sian maldekstran supran incizivon pro malatento. Post 8 horoj la stomatologia sekcio de la 2-a Popola Hospitalo de la urbo replantis al li la denton. Post 3-monata flegado



Plurtuba sun-teleskopo, la unua en la mondo, estas farita en Nankino. Ĝi uziĝas por ĉiudirekta observado al la suno.

ĝi reakiris la funkcion.

Koncernaj medicinaj materialoj montras, ke post 3 horoj sekiĝas la defalintaj dentoj kaj atrofiĝas la sangvazaj nervoj kaj kapilaraj angioj de la dento, kaj pro tio la replantitaj dentoj ege malfacile reakiras la funkcion. La sukcesa reviviĝo de la dento de Zhai Xinxin ja estas miraklo.

## TURISMO

- En Luliang-gubernio en la baseno de la Yunnan-Guizhou-a Altebenaĵo oni trovis grandan koloran sablan arbaron antaŭ nelonge. Tio estas alia natura pejzaĝo post la ŝtona arbaro kaj tera arbaro en la provinco. En tiu bunta mondo vidiĝas ĉarmaj sablaj montpintoj, muroj, pagodoj kaj kolonoj.





Pentraĵoj de Yang Guoying


## MIRINDAĴOJ DE ĈINIO

# *Pikturo de senmana Yang Guoying*

Fotoj de WU XINHUA

La raporto pri pentrado far senmana Yang Guoying sur la interna flanko de snufkruĉo, telesendita de la Centra Televido de Ĉinio, faris sensacion en- kaj eksterlande. Mi intervjuis la 25-jaran artiston kaj vidis, ke li faras la pentraĵon "Scenoj apud Rivero en la Festo de Klara kaj Brilo" (parto) kun pli ol 70 homfiguroj, fama verko de Song-dinastio (960-1279), sur la interna flanko de snufkruĉo, en grandeco de duonmanplato, tenante penikon per stumpo de mandrako, trairentan la malgrandan buŝon de la kruĉo. Liaj pentraĵoj sur la interna flanko de vazo, kruĉo k.a. estas mirindaj en Ĉinio kaj lia senmana pentrado malof- ta en la mondo.

Yang Guoying en pentrado



**BRECHT BERTOLT** (Germanio):

## Legendo pri la kreiĝo de la libro *Taŭtekingo dum la elmigrado de Laŭzio*

*Diras Hoŭ Ĝueljang en sia libro ANTIKVAJ FILOZOFOJ DE ĈINIO (p. 19): "...bizara figuro aperis al mi en la kapo. Li estas filozofo rajdanta sur la dorso de nigra bovo: Laŭzio."*

**Rikardo Ŝulco**

Sepdekjara instruist' kaduka  
Fine ja sopiras al ripoz'.  
Ĉar enlanda la malic' fariĝis ree suka,  
Dum denove la bonecon trafis ankiroz'.  
Vivu li nun per almoz'!

Kaj enpakis li laŭ la bezono  
Tion ĉi kaj tion, multon ne,  
Sian pipon, ke ĝi estu je dispono,  
Kaj libreton pro la melope',  
Kaj flakonon kun ole'.

Ĝojis pri la valo kaj ĝin tuj forgesis,  
Kiam li alvenis al montar'.  
Pro la freŝaj herboj lia bov' ekscesis,  
Maĉis. Iris pace tiu par',  
Best', kaj vir' kun griza har'.

Sed la kvaran tagon inter rokoj  
Lian vojon baris doganist'.  
"He, migrul'!" aŭdiĝis ties voko.  
Diris tuj la bova knab': "Li estis povra instru-  
ist'."  
Do, jam ĉesis la insist'.

Sed la vir' kun emoci' ekgapas:  
"Kion trovis do la instruist'?"  
Kaj la knabo: "Ke la gutoj, kiuj daŭre frapas,  
Eĉ graniton venkas per persist'.  
Ĉio dura restas sen rezist'".

Por ne perdi lastan lumon de la tago,  
Nun la bovon pelis plu la knab'.  
La triopo malaperis jam post ruĝa fago.  
Kriis nia vir' de l' bara trab':  
"Haltu! Ĉu ne iu rab'?"

Kion diris vi pri tiuj gutoj,  
Maljunul'?" "Ĉu tial via kri'?" —  
"Emas trinki mi el ĉiuj putoj.

Kiu kiun venkas, volas scii mi.  
Tion diru vi!

Diktu ĉion vi, kaj laŭ konvinko!  
Tion oni prenas ne kun si.  
Estas ja paper' ĉe ni kaj inko,  
Noktomango por la knabo kaj por vi.  
Zorge skribu li!"

Kun atent' rigardis la oldulo  
La senŝuan viron en ĉifon'.  
Kaj li miris tre pri la stimulo.  
Tiu estis certe ne fripon'.  
Tiu petis pro bezon'.

Estis la oldulo jam tro aĝa  
Por la malakcept' de deca pet'.  
Ĉar li diris: "Al demando saĝa  
Mi respondu." "Ankaŭ malvarmiĝis," diris la  
knabet'.  
"Bone, estu restadet'!"

Deboviĝis la saĝulo paŭte.  
Skribis do la knabo laŭ komand'.  
Zorgis pri manĝaj' la doganist' kaj sakris mal-  
pli laŭte  
Tutatempe pro la kontraband'  
El kaj en la land'.

Al la doganist' la knab' transdonis  
Okdek unu saĝajn dirojn je l' maten'.  
Vir' kaj knabo multon nun ne plu rezonis,  
Kaj daŭrigis preterfage la promen'.  
Ĉu sufiĉis do la pen'?

Sed vi laŭdu ne nur la saĝulon,  
Kies nomo pompas sur la blank',  
Ĉar saĝul' bezonas senti iun ajn stimulon.  
Al la doganist' do ankaŭ dank'  
Pro l' stimul' de lia flank'!

(Versio el la germana lingvo: Rikardo Ŝulco)



# Tranokto ĉe Meizigou

(Novelo)

**V**ESPERE de frua aŭtuno luksa pasaĝerŝipo veturanta en Taihu-lago subite deviis de la navigvojo kaj turnis sin en golfeton, kie kreskis multe da fragmitoj. Kiel timigitaj kolomboj, la pasaĝeroj ŝovis la kapon el la fenestroj de la kajuto por informiĝi pri la afero. La ŝipestro informis en mikrofono: "Ni estis ĵus informitaj de la meteoservo, ke post la deka horo ĉi-nokte estos ventego de sepa grado. Por garantii sekurecon ni decidis halti en plej proksima ankrojo en la nokto. Estu trankvilaj, forlasu la ferdekon kaj restu en la kajutoj. Dankon."

Mezaĝulo en okulvitroj estis staranta sin apogante sur balustrado de la tribordo. Li apatie aŭskultis la disaŭdigon kaj rigardis foren. Lin intime akompanis svelta kaj serena sinjorino. Ŝi estis lia edzino. La suno jam kaŝiĝis sub la horizonto kaj leviĝis en la okcidenta foraĵo maldensa nebulo, kiu vualis palan vesperruĝon. La akvo estis rongita de la labordo kun fragmitoj. La

atmosfera premo estis malalta. La aero estis tiel solida kaj stagna, kvazaŭ oni povus ĝin kapti. Senombraj ruĝaj libeloj aktivadis malalte super la akvo, kaj kelke da apusoj ĵetiĝis jen sor jen sob kiel falfolioj. Varma marĉa haladzo envolvis la homojn. La vidaĵo malsemena kaj trista facile puŝis homojn en rememoron pri adstringa paseo.

La ŝipo faris cirklon sur la akvo kaj turnis la pruon eksteren, haltis subvente kaj ellasis la ankron. Je la bruo de vinĉo, la ankro brue malleviĝis en la akvon trenante la ĉenon. Post tio regis kvieto.

"Ni iru enen," tenere diris la sinjorino.

"Vi iru la unua, mi volas resti ĉi tie por iom da tempo," diris la viro. Lin preteriris ŝipano, kaj ĉi tiun li demandis: "Kiel nomiĝas la loko?"

"Meizigou."

"Meizigou?"

"Jes."

La viro ŝovetis la okulvitrojn kaj fiksas la rigardon sur iu punkto en la foraĵo. La virino sekvis lian rigardon per la okuloj. Sed tiam ĉio

malklariĝis pro la falo de nokta kurteno.

"Vi maltrankviliĝas!" diris la virino palpebrumante.

Li mistike ekridis al ŝi aŭ jese aŭ nee.

Reveninte en la kajuton, ili sidis vidalvide kun krucitaj kruroj. Post kelka tempo li hezite ekparolis: "Antaŭ 20 jaroj, kiam mi laboris en la kamparo, mi ja loĝis ĉi tie, en fragmitejo."

"Ĉu? En kiu fragmitejo?"

"Mi ne povas precize diri. La tereno estas ŝanĝiĝema ĉe la fluso kaj malfluso. Estas malfacile rekoni la lokon. Tiam mia laboro estis paŝtado de 200 anasinoj. Izolita de la mondo, mi sola loĝis en iu fragmitejo. La anasejo sin lokis ĉe la fino de la fragmitejo. Post ĝi estis senlima fragmitejo, kaj antaŭ ĝi sterniĝis longa marĉo, kaj trans la marĉo denove senlima fragmitejo. La plej proksima vilaĝo distancis de mia loko 20-30 kilometrojn. De printempo ĝis aŭtuno de tiu jaro mi neniam foriris de la fragmitejo. Ĉiumonate oni portis al mi



grenon kaj aliajn necesojn kaj forportis anasovojn. Sed oni venadis ne akurate, unue ĉe la komenco de monato, poste en la mezo, poste en la fino, kaj ofte okazis elĉerpiĝo de greno. Tiam mi devis satigi min per sovaĝaj faboj, iaj herboj, krabetoj, salikokoj kaj junaj radikoj de fragmitoj. Kompreneble mi manĝis ankaŭ anasovojn...”

“Vi ja estas frandema.”

“Jes, mi frandis kun larmoj. Mi elektadis taŭgan manieron de sinmortigo.”

“Kion vi fine elektis?”

“Sinpendigon kaj sindronigon mi ne ŝatis. Mi venis al la fina elekto — tranĉi la kolon. Mi havis falĉileton tre akran.”

“Sed kio retenis vin de tio?”

“Ne ridu. Se mi sukcesus, al kiu vi edziniĝus?”

“Jes, vi diris prave.”

“Tiam mi kuŝiĝis surtere antaŭ la anasejo. Mi firme tenis la falĉileton en la dekstra mano kaj turnis la kapon maldekstren, por ke la arterio elstariĝu. Subite mi rememoris indikon pri ĝusta maniero de koltranĉo — uzi la maldekstran manon por tranĉi la dekstran kolan arterion. Mi transmetis la falĉileton en la maldekstran manon. Tiamaniere mia vizaĝo frontis al la sovaĝa marĉo kaj mia rigardo falis sur la randon de la fragmitejo trans la marĉo...”

“Certe vi vidis ion altiran.”

“Jes.”

“Kion do?”

“Homo, viva homo!”

“Virino, junulino!”

“Jes.”

“Mi facile divenis. En tiaj cirkonstancoj nur viva virino povis savi vin. Virino havas mirindan forton. Kaj multaj filmoj kaj romanoj prezentis tian romantikan rakonton.”

“Tio ne estas romantika rakonto, sed vera okazaĵo... Mi vidis fraŭlinon en ruĝa vesto. Estis mateno post pluvo. La suno ĵus leviĝis. Sur la verda fono de fragmitoj draste kontrastis la ruĝa punkto! Ŝi estis bela floro, brulanta kandelo. Ŝi forpelis la misteron kaj makbrecon de la senhoma lago kaj

splendis super la tuta tero. Pretervole mi malstreĉis la manon kun la falĉileto kaj leviĝis lante. Mi larĝe malfermis la okulojn kaj buŝon, surprizite, ĝoje kaj mire. Mi pensis, ke mi vidis koboldinon, niksion. Subite mi pafis min supren kaj kuregis al la bordo. Mi dronis en la marĉo ĝis la genuoj. Mi freneze svingadis la brakojn kaj kriegis. Sed ŝi ne povis aŭdi min, ĉar mi distancis de ŝi almenaŭ duonkilometron. Fine ŝi rimarkis min kaj fikse rigardis min. Matena vento flirtigis ŝiajn harojn kvazaŭ nigran silkan flagon. Ŝi alte levis la brakojn kaj energie svingadis ilin. Mi larmis de ekscitiĝo kaj ekstremis mia tuta korpo...”

“En tiu momento vi jam enamiĝis al ŝi.”

“Vi povas tiel aserti. Tamen ŝia figuro tuj enradikiĝis en mia koro, neniam forviŝebla.”

“Sed antaŭe vi neniam rakontis tion al mi... Kaj kio okazis poste?”

“Mi pensis, ke ŝi hazarde aperis; sed fakte, same kiel mi, ŝi loĝis en la fragmitejo trans la marĉo. La sekvantan matenon mi refoje vidis ŝin en ruĝa vesto. Ŝi ĉiam portis ruĝan veston. Poste, kvazaŭ interkonsentite, ni vidis unu la alian ĉiumatene en la sama loko. Ni rigardadis kaj mansvingis unu al la alia. Poste ni renkontiĝis pli kaj pli ofte, tri fofojn en tago — matene, tagmeze kaj vespere. Nek ventego nek pluvego povis interrompi nian renkontiĝon... De tiam mi sentis la vivon solida kaj la estontecon esperiga. La tagoj en la fragmitejo ne estis plu morte enuigaj...”

“Ĉu vi neniam intencis trairi la marĉon por kontaktiĝi kun ŝi?”

“Tion mi aspiroregis, mi preskaŭ frenezigiĝis. Sed tio estis neebla, ĉar la marĉo estis netravadebla. Krome neniu vojo troviĝis en la fragmitejo, kaj plie, mi ne povis forlasi la anasojn.”

“Bedaŭrinde, videbla, sed ne atingebla. Via unua amo estis tre originala, romantika, kortuŝa kaj ankaŭ tragika. Sed mi kredas, ke la geamantoj estas sufiĉe saĝaj por trovi metodon interkomunikiĝi.”

“Jes, ni elpensis metodon. Ni respektive faris daŭran fajron. Du

fumkolonoj leviĝis kaj nature renkontiĝis, intermiksiĝis kaj kunfandiĝis super la marĉo, se ne blovis vento. Tiam mia animo estis konsolita, gajigita kaj kontentigita. Mi kredis, ke ŝi havis saman animstacion kiel mi...”

“Vi vere estis tre saĝaj, ke vi turnis nevideblan senton en videblan. Kio poste?”

“Estis sezono de falĉado de fragmitoj, kaj, plenuminte mian taskon de anaspaŝtado kaj ovokolektado, mi devis forlasi la fragmitejon. Tiun matenon mi konsterniĝis. Mi ne kuraĝis vidi ŝin lastfoje en la sama loko. Mi kaŝiĝis kaj atendis ŝian aperon. Kiam mi vidis ŝian malgrandan ruĝan figuron maltrankvile moviĝanta trans la marĉo, mi dolore fermis la okulojn. Mi ne havis la kuraĝon rigardi ŝin. Mi kuŝiĝis sur la malvarma tero, vizaĝe al la ĉielo, kaj ekploregis. Tra larmoj mi vidis du fumkolonojn intermiksiĝantaj kaj kunfandiĝantaj... Mi klare aŭdis krakadon en mia brusto, mia koro estis disrompiĝanta...”

“Tiel vi foriris?”

“Jes.”

“Eble vi tute ne sciis ŝian nomon?”

“Ne.”

“Kaj ne sciis, kiel ŝi aspektas?”

“Mi kredis, ke ŝi estas tre bela.”

“Sendube, ŝi devis esti bela... Sed kial vi ne serĉis ŝin poste?”

“Ĉesu.” Li subite klinis la kapon, demetis la okulvitrojn kaj longe silentis. Kiam li relevis la vizaĝon, ŝi vidis larmojn ruliĝantaj el liaj okuloj.

Ŝi serioze rigardis lin kaj simpatie karesis liajn manojn.

La meteoprognozo estis ĝusta. Apenaŭ batis la 22-a, leviĝis ventego sur la lago. La ventego muĝis super la fragmitaro, bruantaj ondegoj frapis kaj balancis la ŝipon. La ventegon sekvis pluvego. Akveroj kovris la fenestrovitrojn lumigatajn de lampo.

Ŝi pretigis la liton, ŝovis ion sub la kapkusenon por fari ĝin pli dika kaj karese petis lin kuŝiĝi. La ventego forblovis la sufokan varmon en la kajuto. Ŝi baldaŭ endormiĝis





en komforta lito, dum li neniel povis endormiĝi. Li fumadis cigaredon post cigaredo en la lito, aŭskultante la bruon de la vento kaj pluvo. Li fine havis dormeton ĉe tagiĝo.

Heligiĝis. Ĉesis la pluvo kaj vento. La freŝa suno elsaltis el sub la akvo. La ŝipo ekveturis. Vigla laboro reĝis sur la ŝipo. Ili lavis al si la vizaĝon kaj eliris sur la ferdekon por ĝui freŝan aeron. La ŝipo jam elveturis el la golfeto kaj la fragmitejo pli kaj pli malproksimiĝis. Li rigardis la foriĝantan fragmitejon. La pala vizaĝo kaj kunŝovitaj brovoj atestis, ke li ankoraŭ dronis en la rememoro de la pasinta nokto.

Ŝi tuŝis lin per sia kubuto kaj ŝerce diris al li: "Ho, sinjoro, liberigu vin el la ĉagreno, ne sopiru pluvian amatinon en ruĝa vesto. Estu gaja..."

"Vi ne scias..." serioze li diris al la edzino, anstataŭ respondi ŝian ŝercon kiel kutime. "Mi devas diri al vi, ke poste mi serĉis ŝin."

"Kiam?"

"Post kvin jaroj."

"Post kvin jaroj? Sed tiam ni jam interkonatiĝis kaj enamiĝis."

"Jes..."

"Kaj tiam vi ja devus diri al mi pri ŝi. Ĉu vi timis, ke tio ŝokos min? Ne. Mi povus akompani vin por serĉi ŝin."

"Tion mi ne dubas. Sed tiam mi ne volis malkaŝi tion al vi. Mi volis teni la sekreton, ke neniu dividu kun mi la plezuron kaj amaron."

"Ĉu vi trovis ŝin?"

"Jes."

"Certe kortuŝa kaj drama estis via renkontiĝo post la disiĝo."

"Povus esti tiel. Mi staris tutan posttagmezon antaŭ ŝia tombo. Mi fosis per miaj manoj du kavojn kaj plantis du persikarbojn ĉe ŝia tombo. Miaj dek fingroj sangis de fosado..."

"Ŝi mortis?!"

"Ŝi mortis. Ŝi mortis jam tri jarojn antaŭ mia alveno."

"Kiel ŝi mortis?"

"Mi ne scias. Eble ŝi sin mortigis,

is, aŭ oni enterigis ŝin viva."

"Enterigita viva!? Kial?"

"Vilaĝanoj diris al mi, ke ŝin trafis infekta malsano. En ŝia loko estis barbara kutimo enterigi leprulon viva."

"Tia barbaraĵo okazis nur antaŭ dekoj da jaroj. Ĉu nun oni ankoraŭ tiel faras?"

"Tial mi diris, ke eble ŝi sin mortigis. Ŝi estis izolita kaj ekzilita al la fragmitejo kaj tie ŝi trenis sian vivon du jarojn."

"Sed fine ŝi ne povis elteni la turmentadon kaj..."

"Mi aŭdis, ke ŝi estis tre bela, kaj estis ankoraŭ bela post malsaniĝo. Ŝi amis belecon kaj ĉiam portis puran ruĝan veston..."

"Ho, vere estis ŝi!" ŝi ekploris.

Ili silentis longan tempon. Poste ŝi viŝis al si la okulojn kaj serioze diris dankon al la edzo, ke li malkaŝis al ŝi sian sekreton kaj permesis al ŝi rememori kun li la senroman junulinon en ruĝa vesto kaj percepti kaj dividi kun li ian profundan senton. Ŝi diris: "Verdire, mi envias la junulinon. Dio ne donis al mi la ŝancon kiel al ŝi, ke mi povu savi vin el la malespero, kaj vi neniam forgesu min eĉ post mia morto... kaj samtempe mi esperas ion alian..."

"Kion?"

"Mi pensas, ke ni devas domaĝi kaj alte taksi ĉiun momenton de nia kunestado."

"Jes, ankaŭ mi ofte tion esperas," en emociiĝo li diris, sereniĝante la brovojn. Ŝi levis la vizaĝon kaj donis al li brilan komprenan rideton.

La ŝipo eniris en vastegan akvon. La surfaco de la lago reflektis orajn brilojn de la leviganta suno.

\* Ye Weilin, verkisto kaj poeto, naskiĝis en 1934 en Huiyang-gubernio de Guangdong-provinco. Lia verkado komenciĝis en 1954. Lia ĉefverko estas kolekto de noveloj kaj eseoj "Blua roĝo Mulan". En 1980 li publikigis sian romanon "Sur rivero sen buoj" kaj gajnis la unuan premion de la lando por romanoj verkitaĵoj en 1977-1980.

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo: Du internaciaj respond-kuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

\* Zhuang Qixiong, 27-j. kuracisto, dez. kor. tm pri ĉiuj temoj kaj interŝ. pm. kaj bk. Adr.: Guang Zhou Lu 72, Nankino, Jiangsu, 210008 Ĉinio.

\* Fu Guoqing, filatelisto, dez. kor. tm., serĉas leteramikojn el diversaj landoj, interŝ. pm. bk. cigaredujon kaj esperantajn librojn, kaj certe respondos. Bonvolu glui memor-poŝtmarkojn sur la koverto. Estu havebla ĉe mi listo de ĉinaj pm. por interŝ. Adr.: Dian Ji Chang, 10 Che Jian, Harbin, Heilongjiang, 150040, Ĉinio.

\* Guo Lihong, 25-j. instruistino, dez. kor. tm. pri diversaj temoj, spe. lingvoj, traduko, interŝ. librojn kaj gazetojn. Respondos per Esperanto, angla aŭ rusa lingvo. Adr.: Basic Subjects Dept., Zhengzhou Textile Institute, 41 Zhongyuan Rd. (W), Zhengzhou, Henan, 450007, Ĉinio.

\* Baudoin Lambert, 37-j., dez. edziĝi kun vegetaranino. Adr.: 204 rue Sart thiri, 4460 Horion Hoze-mont, Belgio.

\* Skribu malnovaj kaj novaj geamikoj el diversaj temoj sed skribu sian adreson klare. Juho Ilmari Vattulainen, 81160 Romppala, Rantakylan tie 64, Suomi Finlando.

\* Ni jam havas 340 perkorespondajn lernantojn en diversaj landoj el Afriko. Ni povus ankoraŭ multe plialtigi tiun nombron sed ni bezonas financan helpon. Pro tio ni kolektas kaj vendas poŝtmarkojn. Ĉu vi volas helpi nin? Sendu al Esperanto-Kurso Bp 7073 F-34080 Montpellier Francio ĉiujn ajn pm. novajn aŭ stampitajn kiujn vi trovos. Antaŭdankojn de nia afrika servo.

\* Maria Ivančova, 26-j. fraŭ-

lino, volas korespondi kun gesamideanoj el la tuta mondo, interesiĝas pri astronomio. Adr.: Dukelska 400, 078 01 Sečovce, Ĉeĥoslovakio.

\* Geesperantistoj de E-rondeto dez. kor. kun esperantistoj, komentantoj kaj spertantoj, ankaŭ kun E-klubo tm. pri ĉt.. Adr.: ZK ROH ĈKD, Esperanta rondeto, CS-678 11 Blansko, Ĉeĥoslovakio.

\* Jens Merker, 25-j. studento, dez. kor. tm., interesiĝas pri geografio, komputilo, libroj, turismo kaj muziko. Adr.: Bautzener Str 12, Cottbus, 7500 Germanio.

\* Cristina Marcu dez. kor. tm. pri ĉt.. Adr.: Aleea Cringului 5 BL 203 Sc B, et IV apt 9, 2200 Brasov, Rumanio.

\* Marilena Nica dez. kor. tm. pri ĉt.. Adr.: Str. Codrul Cosminului Nr 72, BL 16 sc A ap 3, 2200 Brasov, Rumanio.

\* Klaus Dieter Scholz, 31-j. filatelisto dez. kontakti kolektantojn en Ĉinio. Adr.: Psf 2078, Erfurt, 5060 Germanio.

\* Renata Banevičiute dez. kor. tm. pri ĉt.. Adr.: Str. Vairo 14-149, 232044 Vilnius, Litovio, Sovetunio.

\* Jadranka šoŝtaric, 21-j. fraŭlino, dez. kor. kun geesperantistoj el Britio pri diversaj temoj. Adr.: ul 1 Gregurovica 2, 41 230 Krapina, Jugoslavio.

\* Paulina Tamaszewska dez. kor., interesiĝas pri sporto, kolektas pm.. Adr.: Sobotka 23, 63-450 Sobotka, Woj., Kaliskie, Pollando.

\* 30 gestudentoj (20-j.) el pedagogia altlernejo dez. ligi kontakton kun grupoj de junaj eksterlandanoj. Ili volus renkontiĝi, interŝ. leterojn, esperantaĵojn ktp. Volontuloj skribu al ilia instruistino: Teresa Jankowska, ul. Iwicka 40 nr. 18, PL-00-735 Warszawa, Pollando.

\* Ĉikirjov Boris, 31-j. kuracisto, refleksoterapiisto, volas korespondi kun samprofesianoj, interesiĝas ankaŭ pri muziko, ĥarkajogo kaj arto. Adr.: 188950 Leningradskaja obl, Ojborgskij r-n, Kameno-

gorsk, Bumajnikov 20-73, USSR.

\* Internacia Infana Teatro de Danco kaj Kanzono "Tintilo" el Varsovio havas belan programon en Esperanto. Ili atendas proponojn por elpaŝi en E-Kongresoj, renkontiĝoj ktp. Interesitoj bonvolu skribi al: Teresa Jankowska, ul. Iwicka 40 m. 18, PL-00-735 Warszawa, Pollando.

\* Beata Prus, 30-j. sinjorino, interesiĝas pri sporto, literaturo, Esperanto, turismo; kolektas bildkartojn, poŝtmarkojn kaj lerneajn ŝildojn. Adr.: PL 34-120 Andrychow, ul. Starowiejka 10/12, Pollando.

\* Barbara Gleruszczak, 27-j. fraŭlino, interesiĝas pri turismo, problemoj de la homoj, religioj, ekumenaj aferoj kaj Indio. Adr.: PL-34-120 Andrychow, ul. 27 Stycznia 10/16, Pollando.

\* Barbara Potempa, 50-j. sinjorino, interesiĝas pri pentrarto, skulptarto kaj brodarto. Adr.: P.O. Kesto 181, PL-34-120 Andrychow, Sulkowice 321, Pollando.

\* Barbara Borgosz, 20-j. fraŭlino, interesiĝas pri turismo, danco kaj kolektas bildkartojn. Adr.: Targanice 616, PL-34-120 Andrychow, Pollando.

\* Dariusz Kudlacik, 24-j. fraŭlo, dez. kor. pri ĉiuj temoj. Adr.: Czaniec 793, PL-34-314 Czaniec, Pollando.

\* Jan Gibas, 30-j. fraŭlo, dez. kor. pri ĉiuj temoj. Adr.: PL-34-122 Wieprz 408, Pollando.

\* Krzysztof Kudlacik, 25-j. fraŭlo, interesiĝas pri naturo, muziko, turismo kaj danco. Adr.: Targanice 304, PL-34-120 Andrychow, Pollando.

\* Wladyslawa Okrzos, sinjorino, dez. kor. pri ĉiuj temoj, interesiĝas pri turismo. Adr.: PL-34-120 Andrychow, ul. Podgorska 7, Pollando.

\* Klaus-Dieter Scholz, 30-j. dez. kor. tm. Esperante, germane, indonezie, hispane, angle kaj ruse. Adr.: PSF 2078, Erfurt, 5060 Germanio.

# Blanka ĉevalo ne estas ĉevalo

de HOU JUELIANG

**G**ONGSUN Long estis tre interesa filozofo. Iuj liaj filozofiaj tezoj defiis ĝeneralajn sciojn de homoj. Pro liaj duboj oni ne povis ne rigardi iujn tre popularajn problemojn laŭ novaj vidpunktoj. Ekz., la logika juĝo “blanka ĉevalo estas ĉevalo” kongruas kun konado de homoj. Tamen Gongsun Long prezentis la tezon “blanka ĉevalo ne estas ĉevalo”, kiu cirkulas de miloj da jaroj.

Sur kio baziĝas la tezo?

Gongsun Long opiniis, ke “blanka” determinas la koloron de ĉevalo, kaj “ĉevalo” ĝian figuron. “Blanka” ne estas uzata por montri la figuron de ĉevalo. Tial, kombine, “blanka” kaj “ĉevalo” ne plu signifas simple “ĉevalon” (nome, ne plu la abstraktan nocion de “ĉevalo”).

Kiel li ekzemplis, se oni kondukos ĉevalon el stalo, oni povos elekti nigran aŭ flavan ĉevalon en ĝi. Se oni kondukos nur blankan ĉevalon, la flava kaj la nigra do ne estos dezirataj. Kiam oni venos al la stalo, alkuros la ĉevaloj flava kaj nigra, oni do povos rigardi ilin kiel ĉevalojn, kaj ne kiel blankajn ĉevalojn. Evidente, klariĝis la tezo, ke “blanka ĉevalo ne estas ĉevalo”.

Antaŭ pli ol 2 300 jaroj Gongsun Long jam havis pli profundan konadon ol ordinaraj homoj. Li ne limigis sin per la elementa scio, ke “blanka ĉevalo estas ĉevalo”. Li trovis kontraŭdiron en tiu ĝenerala juĝo, nome la kontraŭdiron inter nocio kaj juĝo. Laŭ Gongsun Long,

la nocio de “blanka ĉevalo” estas tre konkreta, kaj tiu de “ĉevalo” tre abstrakta. Tamen, la ĝenerala juĝo estas sufiĉe kontraŭdira: Blanka ĉevalo estas ĉevalo. Tio signifas, ke la konkreta blanka ĉevalo estas la abstrakta ĉevalo; alivorte, konkreta afero estas abstrakta afero. Tion Gongsun Long ne povis akcepti. Li do defiis la ĝeneralan konadon kaj asertis: “Blanka ĉevalo ne estas ĉevalo!” Se oni klarigos lian filozofian tezon, ĝi devas esti: Konkreta ĉevalo ne estas abstrakta ĉevalo, kaj konkreta afero ne estas abstrakta afero.

El tio videblas, ke la filozofia tezo “blanka ĉevalo ne estas ĉevalo” markis la altiĝon de la komprenopovo de antikvaj ĉinaj filozofoj. Ili jam rimarkis la rilatojn inter konkreto kaj abstrakto, parto kaj tuto, partikulareco kaj ĝeneraleco, individueco kaj komuneco. Gongsun Long la unua prezentis tiun tezon, kiu aldonis al filozofio novan kategorion — jen lia merito.

Gongsun Long vidis la diferencon inter parto kaj tuto, la kontraŭdiron en la homa konado kaj la antipodon inter la kontraŭaj flankoj de la afero. Sed li ne vidis nek komprenis, ke la du kontraŭaj flankoj povas unuiĝi, tial li ne komprenis, ke parto kaj tuto povas unuiĝi, la “blanka ĉevalo” kaj “ĉevalo” povas unuiĝi, “blanka ĉevalo estas ĉevalo” estas unuiĝo de parto kaj tuto.

Gongsun Long studis formalan logikon, tamen, limigite de la homa konado siatempe, li ankoraŭ ne sciis, ke “parto estas entenata en

tuto”. Kiam oni diras, ke ĉino estas homo, polo estas homo, tio signifas, ke “parto estas entenata en tuto”. “Ĉino” kaj “polo” estas “parto”, dum “homo” estas “tuto”. La esenca trajto de “aparta homo” estas ĝuste la komuna trajto de “homo”. La komuneco de “homo” kuŝas en la individueco de “ĉino” kaj “polo”, kaj la “individueco” de tiuj “apartaj homoj” kune ekzistas en la komuneco de “homo”. Tial en la komuneco estas individueco, kaj en la individueco estas komuneco. Individueco kaj komuneco, nome parto kaj tuto, estas kaj diferencaj kaj unuecaj, alivorte, kaj kontraŭaj kaj interligitaj. Same, ankaŭ “blanka ĉevalo” kiel “parto” povas unuiĝi kun “ĉevalo” kiel “tuto”. La esenca trajto de “blanka ĉevalo” estas entenata en la komuna trajto de “ĉevalo”. La diro, ke “blanka ĉevalo estas ĉevalo”, same kiel la diro, ke “ĉino estas homo” kaj “polo estas homo”, aludas, ke “parto estas entenata en tuto”. La pensmaniero de Gongsun Long estas absoluta. Li opiniis, ke blanka ĉevalo ja estas blanka ĉevalo, ĉevalo ja estas ĉevalo, kaj inter blanka ĉevalo kaj ĉevalo estas nur kontraŭeco sen unueco, tiel ke li neis la veron, ke “parto estas entenata en tuto”. Ni ne bedaŭru tion! De post kiam li montris la rilatojn inter “parto kaj tuto”, prezentante la tezon “blanka ĉevalo ne estas ĉevalo”. La homa konado senĉese progresis kaj nun oni komplete solvis la problemon.

Laŭ siaj vidpunktoj Gongsun Long faris multe da interesaj kaj



strangaj konkludoj pri aferoj en la universo. Li diris: “Koko havas tri piedojn.” Kial? Laŭ li, du videblas, kaj la tria ne, t.e. abstrakta piedo laŭ koncepto. Li diris: “Fajro ne varmas.” Kial? Laŭ li, “varmo” ne estas objektiva ekzisto, sed sentaĵo. Kiam oni ne sentas fajron, ĝi do ne varmas. Li diris: “La ombro de fluganta birdo ne moviĝas.” Li tion diris, ĉar li rimarkis la relativan movadon de objekto. La ombro ŝajnas fiksita ĉiam je ia distanco for de la birdo, kvazaŭ ne moviĝante. Fakte, ankaŭ la relativa movado estas movado. Kontraŭ aliaj objektoj la ombro de la birdo senĉese moviĝas.

Li diris ankaŭ: “Por rapide fluganta sago estas momento, kiam ĝi nek progresas nek haltas.” Jen temas pri leĝo de la movado: la unueco inter kontinueco kaj malkontinueco de movado. Gongsun Long diris: “Oni povas ŝenfine duonigi vipo.” Li troigis la diron per la vorto “senfine”, ĉar post plurfoja duonigo la vipo ne plu estas vipo, kaj ne eblas “duonigi” ĝin plu. Tamen, la vipo konsistas el ekstreme subtilaj molekuloj kaj atomoj, kaj ankaŭ atomo siavice povas esti dividita. La saĝa Gongsun Long komencis sondi la materian strukturon, kaj faris hipotezon pri la mikrokosmo. Krome, li donis ankaŭ malfacile kompreneblajn juĝojn, kiel “okulo ne vidas”, “testudo pli longas ol serpento”, “ĉevalo havas ovon” ktp.

Gongsun Long (325-250 a.K.) vivis en la epoko, kiam feŭduloj starigis siajn proprajn reĝimojn kaj cent skoloj konkuris. Tiam, la feŭda sistemo estis anstataŭanta la sklavan, novaj aferoj aperis unuj post aliaj kaj la malnovaj kondukis al pereado tago post tago. Tia anstataŭo manifestiĝis ankaŭ sur la filozofia kampo. Aperis do nova esplortemo — “noci-korekto”. Pro la socia disvolviĝo kaj alterno de novaj kaj malnovaj aferoj, oni ne havis tempon por koni novajn aferojn kaj difini iliajn nociojn, kvankam ili jam ekzistis; kaj multaj malnovaj aferoj jam forvelkis, tamen iliaj nocioj restis senŝanĝaj.



Jen “malakordo inter nocioj kaj faktoj”. Por identigi nociojn kun faktoj necesis korekti la ekzistantajn nociojn. Malsamaj politikaj sintenoj kaj filozofiaj vidpunktoj estigis malsamajn kriteriojn en korektado de nocioj, tio kaŭzis senĉesan disputadon. Konservativuloj ofte restaŭris malnovajn aferojn laŭ malnovaj nocioj, por ke oni parolu kaj konduku ĉiam laŭ la malnova rutino. Tio estas “kongruigi faktojn kun nocioj”. Prudentuloj turnis sian atenton al novaj aferoj, serĉis trafajn nociojn por ili, celante subteni la novajn aferojn en ilia kresko. Tio estas “difini noción laŭ fakto”.

La problemo de “noci-korekto” vekis respondon en la tuta socio, kio spegulis la transformadon de malnovaj aferoj en la novajn kaj la batalon inter la novaj kaj malnovaj pensoj. Tio ne estis pure akademia polemiko. La fakuloj pri la problemo de “noci-korekto” taskis al si esploradon pri la rilatoj inter nocioj kaj faktoj. La nociisma skolo estis nomata “sofisma skolo”. Politikistoj uzis la vorton “sofismo” por ĉiamaniere pravigi sian eraron, sed filozofoj uzis ĝin por esprimi sian racian opinionon.

Nomi Gongsun Long sofisto ne signifas malestimi lin. Fakte, li estis filozofo de la nociisma skolo. Li havis sian propran verkon kaj aron

da disĉiploj. “Esplori la veran efektivecon kaj diskrete trakti la noción” estis lia principo de “noci-korekto”. Li atentis pri la efektiva esplorado pri aferoj, surbaze de tio faris “noci-korekton”, serioze traktis la rilatojn inter “nocio” kaj “fakto” kaj identigis unu kun la alia, por eviti subjektivismon.

Alia reprezentanto de la nociisma skolo estis taoisto Hujzio. Li ofte levis demandojn kaj senĉese diskutis kun Gongsun Long. Gongsun Long diris, ke “blanka ĉevalo ne estas ĉevalo”, li vidis nur kontraŭecojn kaj diferencojn inter objektoj, neante ilian identecon. Sed la opinioj de Hujzio estis malsamaj ol la liaj. Hujzio diris: “La ĉielo kaj la tero estas malaltaj, dum monto kaj lago estas sur sama nivelo.” Li neis la kontraŭecojn kaj diferencojn inter objektoj, vidis nur ilian identecon. La pensmanieroj de ili ambaŭ estis absolutaj. Tamen ili estis materiistoj kaj interesiĝis pri scienco. Hujzio diris: “Mi konas la centron de la mondo, ĝi estas kaj en la nordo de Yan-regno kaj en la sudo de Yue-regno.” Tio estas, ke ĉiu loko sur la terglobo estas la centro de la mondo. Evidente, li havis superhoman konadon. Li ne rigardis la teron kvadrata, kiel aliaj, sed opiniis ĝin ronda. Kredeble li estis la unua filozofo en la mondo, kiu rigardis la teron ronda. ■

## Kiel ĉinoj donas kaj akceptas donacon?

**ĈINOJ** estas ĝentilaj. Ĉe novjara tago, ĉe geedziĝo de amiko, ĉe vizito al malsanulo k.a. ĉinoj kutimas fari donacon.

Ĉinoj ne kutimas donaci florojn. Sed en la lastaj jaroj, iuj ĉinoj ekŝatis donaci florojn opiniante, ke tio montras altklerecon. Ĝenerale ĉinoj donacas bombonojn, fruktojn aŭ vinon, aŭ ludilon al infano, aŭ kukojn kaj tonikaĵojn al maljunulo. Ĉinoj ne solene festas naskiĝtagon, krom tiu de maljunuloj kaj suĉinfanoj, tial ili ne donacas unu al alia salutkarton en naskiĝtago. Sed en la lastaj jaroj furoris ĉe mezlernejoj reciproko de tiaj kartoj. Al novgeedzoj ĉinoj donacas vestojn, ĉiutagajn necesaĵojn aŭ luksaĵetojn. Ĉinoj ne donacas memfari-tajn aŭ jam uzitajn objektojn, ĉar tio povas esti rigardata kiel malestimo. Sed al plej intimaj aŭ plej amataj homoj ĉinoj povas donaci ŝatatan kaj valoran objekton uzatan aŭ longe konservatan por esprimi intimecon kaj eternan amon. La akceptinto bone konservos ĝin por montri sian ŝaton. Tia

donacado okazas ĉe amikoj disiĝontaj por longa tempo kaj ĉe geamantoj.

Ĉinoj uzas ruĝan kaj koloran pakuman materialon, sed ne blankan kaj nigran, ĉar ili rigardas blankon kaj nigron kiel funebrajn kolorojn.

Ĉinoj ne almetas al donaco vizitkarton kaj slipon kun bondeziraj vortoj. Sed sur donacon al novgeedzoj ili kutimas surmeti la ideogramon "feliĉo" eltonditan el ruĝa papero. Kaj sur donacon al maljunulo ili ŝatas almeti la ideogramon "longviveco".

Same kiel alilandanoj, ĉinoj donacas objekton, kiun ili mem ŝatas aŭ opinias bona. La parolo ĉe la prezento de la donaco estas tre interesa. Ĉinoj kutime diras: "Mia donaco estas tre modesta, ĝi nur estas signo de mia bonvolemo." "Mi tre hontas, ke mi ne havas pli bonan por donaci al vi." Tiuj vortoj signifas, ke "vi estas tro nobla, kaj mia donaceto ne estas inda je vi."

Tiam la akceptanto ĝentile for dankas: "Kial vi tiom multe elspezis?" "Mi dankas vin pro via



afableco, sed la donacon mi ne devas akcepti." La donacanto absolute ne pensas, ke la amiko malŝatas la donacon kaj malestimas lin, kaj insistas: "Ĝi estas nur signo de mia amikeco, bonvolu akcepti." La akceptanto fordankas por montri sian humilecon kaj ĝentilecon, kaj lia vera penso estas: "Mi ne havas la honoron ĝui vian valoran donacon, mi ne havas la kuraĝon akcepti."

Ĉinoj ne malpakumas la donacon tuj post akcepto, alie la donacinto sentas ŝokon, ĉar li rigardas tion malĝentila. Se la donaco estas manĝaĵo aŭ trinkaĵo, la akceptinto kutime flankenmetas ilin. Se li tuj prezentas la donacon al la ĉeestantoj, la donacinto pensas, ke li ne ŝatas la donacon aŭ ne havas necesan por regali la gastojn.

Ricevinte donacon, ĉinoj kutime atendas ŝancon por rekomenci la donacinton. ■

## Videobendo "ĈINA MASAĜO"

Ĉu vi volas posedi la teknikon de masaĝo? Por tio vin helpos la videobendo "Ĉina Masaĝo". La videobendo 75-minuta prezentas al vi la masaĝan teknikon por kuracado de oftaj malsanoj, kiel kontuzoj, ostologiaj kaj internaj malsanoj. "Ĉina Masaĝo" en Esperanto PAL (VHS) kostas 80 usonajn dolarojn. Dezirantoj bonvolu sendi la monon al: El Popola Ĉinio P.O. Kesto 77, 24 Baiwanzhuang Lu, Fuchengmen Wai, Pekino, 100037, Ĉinio.

## AMUZOJ

### Humuraĵoj

#### EN BALO

Maria tre bedaŭris, ke preskaŭ tutan vesperon neniu invitis ŝin danci. Tiam, bela kaj senĝena viro venis al ŝi kun rideto. Maria haste stariĝis renkonte al li.

“Fraŭlino, ĉu vi volas danci?” demandis la viro.

“Jes, dankon pro via invito.”

“Nu, mi povas sidi sur via loko.”

#### OKULFERMA SUBSKRIBADO




Post hejmenreveno de la lernejo Pierre demandis sian patron: “Ĉu vi povas skribi vian nomon kun fermitaj okuloj?”

“Kompreneble,” respondis la patro.

“Bonege! Bonvolu do subskribi mian lernonotan kalendaron.”

#### Usonaj bildeniĝoj

Tie estas serio da humuraj bildeniĝoj. Ĉu vi povus diveni, kion ili sugestas? (la solvojn troveblas en ĉi tiu numero)



### Enciklopedieto de Ĉinio

Antaŭ 2 200 jaroj la Unua Imperiestro de Qin-dinastio unuigis Ĉinion kaj fondis Qin-imperion (221 — 206 a.K.), la plej grandan kaj plej civilizitan landon en la tiama mondo. Li kreis burokratismon kun imperiestro kiel la centro, praktikis sistemon de prefektujo kaj gubernio, unuigis la mezurkaj pez-unuojn, starigis novan monsystemon kaj reformis la skriblingvon, ĉio ĉi plifortigis la centralizisman feŭdan reĝimon kaj akcelis la unuigon de la ŝtato kun multaj nacioj.

#### Ĉinaj proverboj

Longa vojo testas la forton  
de ĉevalo,  
Kaj longa tempo provas la  
koron de homo.

Ambicio kreskas dispropor-  
cie al aĝo,

Sen ĝi oni vane pasigas la  
vivon.

Ne avidu alies havon,  
Ne trinku tro multe da vino.

Forgesu vian helpon al aliaj,  
Memoru ĉiam alies helpon.

Ŝajniga kompreno ne donas  
kapablon.

#### Usonaj poemo kaj pentraĵo

##### HAMAKO

Avino donis al mi hamakon,  
Dio levis por mi zefiron,  
Kaj mi volas min plezurigi,  
Sed kiu starigos por mi alian  
arbon?




##### KOREKTO

1. Anstataŭ “1” legu “2” supre dekstre post “El Popola Ĉinio” sur p. 5, n-ro 2, 1991, EPĈ.
2. Superfluas la vortoj “Karikaturo” kaj “Penu! Penu! Penu! Penu!” sur p. 37, maldekstra kolumno, n-ro 2, 1991, EPĈ.
3. Pro malatento ni inversigis la klarigojn “Bildo de dio” kaj “Bildo de generado” sur p. 45, n-ro 2, 1991, EPĈ.
4. Aŝtataŭ “6 3.5 cm” legu “6 × 3.5 cm” kaj anstataŭ “200 400” legu “200 + 400” sur p. 42, n-ro 1, 1991, EPĈ.


La Red.



# Yangjiabu — hejmloko de novjaraj bildoj



Novjaraj bildoj sur pordo




En ĉambro de bofilino

Jam antaŭ 2 000 jaroj en Ĉinio ekfuroris la moro alglui novjarajn bildojn surmure. Ĉe la sojlo de la Nova Jarq oni algluas kiel bonaŭgurajn simbolojn bildon de la dio de gardo sur la fronta pordo de domo, bildon "Oraj karpoj" en la ĉambro de bopatrino, bildon "Ĉarmaj virinoj" en la ĉambro de bofilino, bildon "Kvin

filoj feliĉigas la familion" sur la muro ĉe terlito, eĉ bildon "Prosperaj brutoj" en stalo.

Yangjiabu de Shandong-provinco havas historion de 600 jaroj en farado de novjaraj bildoj kaj estas konata kiel hejmloko de tiaj bildoj. En la loko preskaŭ ĉiuj familioj faras novjarajn bildojn kaj konseviĝas tre valoraj

Fotoj de WU XINHUA



Ornamita ĉefĉambro en la Nova Jaro



Por sekigi novjarajn bildojn ĵus presitajn



En malnova farejo de novjaraj bildoj



antikvaj novjaraj bildoj. Artistoj laboras en farejoj fonditaj en Ming-dinastio (1368-1644), heredante la antikvan metodon de gravurado. Ili mem preparas farbojn kaj uzas tradician pres-metodon. La novjaraj bildoj de Yangjiabu karakteriziĝas per eleganteo de gravurado kaj simpla stilo de la orienta popola kulturo.

# Gimnastiko kontraŭ gastroptozo (I)

de GAO HUARONG kaj YU YAN\*

*Ni jam metis finon al "Ĉina Ĉigong-o" sub la rubriko "Por Via Sano" en nia revuo, 1990. Ekde la nuna numero ni konigos kinezoterapiojn kontraŭ gastroptozo, kormalsano, prolapso de intervertebra disko, ŝultra periartrito kaj neŭrastenio.*

## La Red.

Gastroptozo estas ofta malsano. Kutime ĝi atakas altajn kaj maldikajn homojn. La gastroptozuloj ofte sentas malkomfortecon en la supra ventro kaj ŝveliĝon en la ventro, perdas apetiton, vomemas, ruktas kaj mallaksas. Ifoje ili suferas ankaŭ de ventrodoloreto. Ili sentas pli da malkomforteco en la supra ventro post manĝo kaj laco.

Klinika praktiko pruvas, ke la gimnastika ekzercado povas faciligi al la malsanuloj digestadon, pliigi stomakan kaj intestan moviĝon, moderigi reguligadon de la cerba kortekso al la stomako kaj intestoj, plifortigi la muskolojn de la ventro por ke ĝi havu ian preforton por subteni la stomakon. Tial la ekzercado tre utilas al la resaniĝo.

Nun ni konigos al vi, niaj legantoj, gimnastikon kontraŭ gastroptozo, kiun vi devas fari kŝante.

1. Kuŝu sur la dorso, enspiru per la nazo kaj elspiru per la buŝo, ŝveligu la ventron ĉe la enspiro kaj malŝveligu ĝin ĉe la elspiro. Ĉiu fojo konsistas el en- kaj elspiro. Tion faru 6-12 fojojn.

2. Kuŝu sur la dorso. Levu la brakojn de flanko de la korpo ĝis la flankoj de la kapo ĉe la enspiro kaj remetu ilin ĉe la elspiro. Tion

faru 6-8 fojojn.

3. Forte fleksu la maldekstran kruron ĉe la enspiro kaj rektigu ĝin ĉe la elspiro, kaj poste, fleksu kaj rektigu la dekstran kruron sammaniere. Tion faru 6-12 fojojn.

4. Rektigu la maldekstran kruron kaj forte levu ĝin ĉe la enspiro kaj malrapide remetu ĝin ĉe la elspiro, kaj poste, rektigu, levu kaj remetu la dekstran kruron sammaniere. Tion faru 6-10 fojojn.

(Daŭrigota)

Atentu:

1. La ekzercado devas esti farata iom-post-iome kaj seninterrompe.

2. Neniel retenu la spiradon kaj tenu vin senĝene ĉe la ekzercado.


3. Laŭ la sanstato, malsano kaj aĝo decidu, kiom da fojoj vi faros la ekzercadon. Estas bone, se vi sentas vin komforte post la ekzercado. Ventra doloreto estas natura sekvo de la ekzercado en la komenco. La doloreto mildiĝas post kelkaj tagoj. Se vi ekzercos vin per la gimnastiko 1-3 fojojn ĉiutage, do post unu monato la malsano malserioziĝos kaj post 3-6 monatoj via sanstato rimarkinde pliboniĝos.

4. La ekzercado estas neniel farata tuj post manĝo aŭ ĉe la malsato. Unu horon post manĝo faru ĝin.

5. La gastroptozuloj ne kuru nek saltu.

6. Ne faru la ekzercadon, se vi suferas de gastroentera hemoragio, febro aŭ aliaj gravaj malsanoj.

7. La gimnastiko utilas ankaŭ



al kuraco de aliaj malsanoj en la digesta sistemo. ■

\* Gao Huarong estas membro de la Konsilantaro de la Pekina Ĉigong-a Instituto kaj Yu Yan laboras kiel redaktoro kaj raportistino de la redakcio de la revuo "Amikoj de Sano".



# Subprovinco ĉe landlimo

Teksto de WANG QINGHUA kaj XU YE

Fotoj de XU JINYAN

La vojo Yongchangdao dividiĝas en du branĉojn en la urbo Zhugeliang en Gaoligong-montaro. En la antikveco, pasantoj ĉefe iris la vojon Tengchonglu, sed nun oni kutime iras la vojon Dehonglu.

Dehong, la Taj- kaj Ĝingpo-nacieca Aŭtonoma Subprovinco, situas okcidente de Gaoligong-montaro. En la montaro kaj inter riveroj sterniĝas ebenaĵoj grandaj kaj malgrandaj. Unu el ili estas Dehong, kie tutjare verdas tropikaj kaj subtropikaj vegetaloj. Ĝi estas unu el la plej fekundaj lokoj de Yunnan.

## KORIDORO DE NACIMINORITATOJ


En Dehong loĝas ĝingpo-oj, deang-oj, aĉang-oj kaj taj-oj. Ili beligas la lokon per la de ili kreita originala kulturo.


Sur la vojoj de Santai-montaro sudokcidente de Mangshi, la ĉefurbo de la subprovinco, ofte vidiĝas fortaj ĝingpo-aj viroj. Bronzhaŭtaj kaj nudbrustaj, ili portas kun si glavon kaj bambuan tubon kun vino longan je 0.3 m. Kiam drinkemo atakas ilin, ili do trinkas tason da vino. Se ili renkontas amikojn survoje, ili regalas la lastajn per vino. Se ili renkontas malamikojn,

ili do senkompatate eltiras sian glavon kontraŭ ili.

En la subprovinco vivas pli ol 90 000 ĝingpo-oj. Antaŭ 1 000 jaroj iliaj prapatroj transmigris tien de la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo kaj fine fiksigis en la montaro kun multo da ebenaĵoj. La montaro dotis ĝingpo-ojn per firma karaktero, kion enkorpiĝas la festo Munaozongge, okazanta unufoje ĉiujare. Muñaozongge signifas "dancadon de ĉiuj". Antaŭ la festo, oni starigas sur tero munao-kolonon kun du grandaj tabuloj ĉe la flankoj, unu kun bildo de la impona Himalajo, kiu montras, ke la prapatroj de ĝingpo-oj devenis de la supro de la neĝkovrita montaro, kaj la alia kun bildo de plantaĵoj kaj kortobirdoj, kiu montras, ke ĝingpo-oj aspiras al bela vivo. Danci grupan dancon estas la plej granda solenado de la festo. Viroj kun glavo en la mano kaj virinoj portantaj elegantan jupon kaj arĝente brilantajn ornamojn ĝoje dancas cirkle de mateno ĝis vespero, akompanate de tamburado kaj gongado.

La ĝingpo-a nacieco estas patriota kaj sentima. En 1874 A.R. Margary el Britio enmigris en Ĉinion kaj estis mortigita de ĝingpo-oj kaj la britaj invadantoj gvidataj de li retiriĝis de la landlimo. Tio estas la mondska Margary-evento. Poste, ĝingpo-oj multfoje faris ĝismortan batalon kontraŭ invadantoj kaj defendis la sanktan teritorion de Ĉinio.






Gingpo-oj en Munaozongge-festo



Ruili-rivero



Taj-a knabino festvestita



Birma komercisto ĉe la landlimo

En Santai-montaro vivas la deang-a nacieco kun negranda loĝantaro. Ĝi, kiel unu el la plej antikvaj naciecoj en Dehong, plej frue kultivis teon. Kiam ni estis en hejmo de deang-oj, ni persone spertis la kutimon de deang-oj pri te-trinkado. Tuj post kiam la mastro sidigis nin, li metis du plenmanojn da teo en vazeton kaj verŝis en ĝin akvon. Post kuiro li verŝis fortan teakvon en tason grandan kiel bovokulo. Ni, tre soifaj, eltrinkis la teon per unu tiro. Ĝi estas iom amara kaj ebriga. Ofta trinkado naskas emon, pli fortan, ol tiu de fumado. Trinkinte sufiĉe da tia teo, oni ekvojas kaj neniam soifas dum tuttaga irado.

La tero de ebenaĵo Ruili de Dehong estas tre fekunda. Tie la loĝantoj plejparte estas taj-oj. Ili estas mildaj; belaj kaj bonkoraj. Kiam ni alproksimiĝis al la urbo Ruili, ni vidis, ke malgrandaj etaĝdomoj kun bambuaj muroj kaj tegola tegmento sin kaŝas inter bambuaroj, banjanoj, bananarboj kaj





Rikolto de kafo



Loĝdomo de deangoj

kokosujoj. En vilaĝoj lirlas rojoj kaj ĉie regas kvieto. Vidinte nin, iu taj-o invitis nin al la domo en la hana lingvo kun forta tono de taj-lingvo. Demetinte la ŝuojn, ni eniris la ĉambron kaj sidigis sur bambua mato. La mastro regalis nin per bananoj, anasoj kaj cidonioj, babilante kun ni. Post momento la mastrino invitis nin sidi ĉetabele. Sur la tablo estis metita rostita porkaĵo. Ĝi prepariĝas el karno de kruro kaj dorso. Antaŭ ol baki la karnon, oni devas ĝin kavigi per tranĉo kaj meti en la kavetojn salon, pikan zantoksilan kaj zingibran pulvorojn, ŝenoprazajn striojn kaj pistitan ajlon. Unue oni devas ĝin baksekigi per milda fajro, ŝmiri ĝin per sezama oleo, turnadi ĝin sur fajro ĝis brunigo. La bakaĵo estas apetitveka. Ĝi estas aparte bongusta, se oni prenas ĝin kun supo el radikoj de kordato (*Houttuynia cordata*) kaj acida bambuŝoso. Specoj de manĝa-

milta de budhismo kaj enkonduki- ta el Birmo en Ĉinio. Nun en la pitoreska regiono de taj-oj staras temploj kaj de tempo al tempo aŭdiĝas sonorado. Monaĥejoj kun densaj naciaj trajtoj sidas inter bambuaroj. La leĝo de la Malgranda Vehiklo difinas, ke la taj-a viro devas vivi simplan vivon en monaĥejo por kelke da jaroj, antaŭ ol fariĝi novtipa homo. Por tiu celo la 7-8-jaraj taj-aj knabetoj devas vivi 2-3 jarojn en monaĥejo, lerni sutrojn kaj la tradicion kulturon de la taj-a nacieco. Ĉiumatene en la vilaĝoj de taj-oj aŭdeblas legado de junaj monaĥoj.

## FOIROJ ĈE LANDLIMO

Dehong limtuŝas Birmon, kun landlima linio de 500 km. Iuj vilaĝoj sidas en ambaŭ landoj. En festotagoj loĝantoj ĉe la landlimo vizitas unu alian. Inter la loĝantoj ĉe la landlimo de ambaŭ landoj regas frateco. Ili negocas kaj geedziĝas

joj por taj-oj estas tre diversaj, iuj ege bongustaj manĝaĵoj portas strangajn nomojn, kiaj fritita musko, salato el formikaj ovoĵoj kaj nekuiritaj viandpecoj.

La taj-a nacieco kredas je la Malgranda Vehiklo. Ĝi estis enkonduki- ta el Tajlando kaj Birmo antaŭ 1 000 jaroj. Sendube, ĝi strikte ligiĝis kun la Suda Silka Vojo. La Akvo verŝa Festo de taj-oj originas el religia rito de bramanismo. Poste la rito estis asi-


unu kun alia. En la loko ekzistas de antikve multaj pasejoj, kiuj ligiĝas kun Birmo. Nun funkcias sume 15 foiroj por loĝantoj ĉe la landlimo. Historie Ruili funkciis kiel elirejo sur la Suda Silka Vojo.

Ni kun homfluo venis al foiro kaj estis tuj kaptitaj de la tiea atmosfero. Sur bambuaj standoj bonorde viciĝis legomoj, mangoj kaj artokarpoj kaj vendiĝis ankaŭ tektonaj elefantoj grandaj kaj malgrandaj kaj aliaj lignogravuraĵoj. La butikoj abundas je ĉinaj kaj alilandaj vivbezonaĵoj. Komercistoj el Birmo, Tajlando, Pakistano kaj Hindio traktis negocon en diversaj firmaoj. En la plena paco sentiĝis ekzotismo. En stratoj svarmis viroj kaj virinoj en naciaj kaj ekzotaj vestoj, kiuj parolis en la taj-a, ĉina aŭ birma lingvo. Taj-aj knabinoj en belaj vestoj, negocantaj antaŭ standoj, rigardis pasantojn kun ridetaj okuloj, kvazaŭ naivaj infanoj, dum maljunaj vendistinoj kun ora dentingo en la buŝo lerte marĉandis. Tie oni parolas en malsamaj lingvoj. Estas interese, ke la vendistinoj ĉiam enmetas la kostopagon en mamzonon antaŭ la brusto. En movoplena strato ni vidis taj-an maljunulinon. Ŝi havas orelojn kun orelingaj truoj grandaj kiel malgranda monero. La truo estis ŝtopita per monbiletoj. Tia monujo multe mirigis nin, ke ni eĉ forgesis ŝin foti.

Ĉe la urbo Ruili fluas Ruilrivero kiel landlima rivero. Ĝia supra parto zigzagas en Ĉinio kaj ĝia malsupra parto sin kaŝas en ĝangaloj de Birmo. Ĉe la rivero finiĝas la Suda Silka Vojo en la teritorio de Ĉinio. La vojo Yongchangdao iras de Dali okcidenten kaj finiĝas ĉe la landlimo, tra irante unu subprovincon, du aŭtonomajn subprovincojn de naciminoritatoj kaj 10 guberniojn kaj urbojn, kun longo de 1 000 km.

## EPILOGO

De Tengchong kaj Dehong la Suda Silka Vojo ellandiĝas kaj eniras en Birmon kaj Hindion kaj per Afganio ligiĝas kun la Silka Vojo en la norda parto de Ĉinio. Tiel,



Pagodo brakumita de arbo

grandaj civilizitaj tadiciaj landoj interligiĝas per antikvaj komercaj vojoj, kio helpas multajn alilandanojn koni Ĉinion.

Kiam ni finis la vojaĝon laŭ la Suda Silka Vojo en sudokcidenta Ĉinio, ni bone vidis, ke ĉiuj kon-

struaĵoj kaj statuoj sur ĝi estas kreitaj de pluraj generacioj de la loĝantoj per peniga laboro.

Komence en la mondo ne ekzistis vojo. Pro bezono oni kreis ĝin. De multaj jarcentoj, por faciligi la ekonomian kaj kulturen interŝan-

ĝon inter la popoloj ĉina kaj alilandaj, aperis kaj etendiĝis la Suda Silka Vojo, kiu ludis gravan rolon. Finante nian raporton, ni kore deziras, ke la Suda Silka Vojo etendiĝu plu por la paco kaj progreso de la mondo. ■



# Recitalo de Li Xiuming

Teksto kaj fotoj de **CAI HAIFENG**

Li Xiuming estas fama ĉina filmaktorino. En la pasintaj 20 jaroj ŝi ludis la ĉefrolon en multaj filmoj. Ŝi gajnis la premion "Ora Koko" en la dua seanco kaj premion de plej bona ĉefrolulino en la kvina seanco por la premio "Cent Floroj". De multaj jaroj ŝi deziris fariĝi kantistino. En la pasintaj tri jaroj ŝi diligente lernis kanti kaj fine efektivigis sian deziron.


Estis la unua fojo en Ĉinio, ke filmaktorino donis recitalon. Neatendite, ŝi prezentis ne nur belkantojn kaj popkantojn, sed ankaŭ kantojn el Anhui- kaj pekin-operoj. Pro tio ŝi estis tre admirata de la spektantoj.

Li Xiuming prezentas kanton el la opero "Ruĝa Gvardio de Honghu".





# Aloja Fabriko de Shenyang




La fabriko liveras alojajn materialojn por metalurgio, maŝin-industrio, trafiko, naciddefendo, scienca esploro kaj la industrioj elektronika, elektra, petrola kaj kemia. Ĝi servas ankaŭ per akcepto de specialaj mendoj.

Mendu ĉe: Aloja Fabriko de Shenyang  
Adreso: N-ro 17, Erduan, Dananjie-str., Shenhe-distrikto, Shenyang, Ĉinio  
Telefono: 443065  
Telekso: 80340 SMMB CN

## KATALOGO DE PRODUKTAĴOJ

1. Industria termokupla drato
2. Metal-armita termokuplilo kaj ĝia materialo
3. Kompensa drato por termokuplilo
4. Metal-armita platena termorezistilo
5. Aloja drato por elektra vakuo
6. Aloja drato por sparkila elektrodo
7. Elektro-varmiga aloja drato
8. Elektro-rezistanca aloja drato
9. Aloja drato por veldvergo
10. Nelinea drato por energio-elektra rezistanca drato
11. Kupra-nikela aloja drato  
Magneta softaloja drato
12. Aloja drato de konstanta elasteco

# UNIVERSALA MAŜIN-FABRIKO DE ECHENG



La fabriko produktas ĉefe maŝinojn por ŝufarado, tekstilado, manĝaĵ-prilaboro kaj pakado. Ĝi komercas kun ok landoj kaj regionoj. Se bezone, bonvolu kontakti kun la fabriko per letero, telegramo aŭ persona vizito.

Mendu ĉe:  
Universala Maŝin-fabriko de Echeng  
Adreso: N-ro 318, Wuchangdadao-str.,  
Ezhou, Hubei, Ĉinio  
Telefono: 22781  
Telegramo: 6639

Malnova konstruaĵo en haveno  
de **HOOGELAND MARIËT**  
(Nederlando)



Ĉe sunsubiro

de **SIEGFRIED BAIER** (Germanio)

